


M^ondo

SENDEPENDA

Hobio
Fiŝkaptado
per forko



Energiokvantoj en la mondo

Vidpunkto
La atenco en Usono

Prezoj¹ 5. 10. 2001

		MONATO		LA JARO
		surf.	aere	aere
Aŭstralio	AUD	72	81	11
Aŭstrio	EUR	39	44	5
Belgio	EUR	39	44	5
Britio	GBP	29	32,6	3,6
Danio	DKK	298	336	38
Finnlando	EUR	39	44	5
Francio	EUR	39	44	5
Germanio (ok.)	EUR	39	44	5
Germanio (or.)	EUR	32	37	5
Hispanio	EUR	32	37	5
Irlando	EUR	39	44	5
Islando	EUR	39	44	5
Israelo	EUR	32	37	5
Italio	EUR	39	44	5
Japanio	JPY	5900	6760	860
Kanado	CAD	67	76	9
Luksemburgo	EUR	39	44	5
Nederlando	EUR	39	44	5
Norvegio	NOK	340	384	44
Nov-Zelando	NZD	83	94	12
Pollando	PLN	70	90	20
Portugalia	EUR	28	33	5
Sud-Afriko	EUR	32	37	5
Svedio	SEK	369	418	49
Svislando	CHF	65	74	9
Usono	USD	47	53	8

Retaversio 60% de la surfaca tarifo

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopilo +32 32 33 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be.



Al kiu pagi?

al via landa peranto

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: esperfed@ans.com.au
Aŭstria: AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: esperanto.aem@chello.at
Belga: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: monato@fel.esperanto.be.
Brazila: BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia (DF). R: bel@bmet.com.br.
Britaj: Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: paul@esperanto.freeserve.co.uk.
Ĉeĥa: Vládslav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice. R: vlada_hasala@iol.cz.
Ĉina: El popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing. R: libroservo@china-report.com.
Dana: Revuservo de DEA, c/o Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800 Nykøbing F, Danio. Tel.: +45 54 82 95 86/PTel.: +45 40 53 25 06. Rete: frederikeriksen@post.cybercity.dk.
Estonia: Virve Emits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.
Filipina: Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: fam.fuehrer@t-online.de
Finnaj: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647.
 • Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.
Francaj: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: esperanto-france@esperanto.org
 • Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz. R: eo-metz@osiek.org
Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: smaul86150@aol.com • Consuelo Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: 115471-758 ĉe Postbank Karlsruhe; bankkodo 660 100 75). R: fam.fuehrer@t-online.de • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: RoBo.ESPERO@t-online.de.
Hispana: Juan Azcuénaga Viema, General Dávila, 127, portal 7, 2ª izda., Santander (BBVA: 0182-3800-33-0203548535).
Hungara: Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: akovacs@cosoft-bt.com.
Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.
Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.
Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).
Japanaj: Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: jei@mre.biglobe.ne.jp.
 KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
Kataluna: KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).
Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: kanadano@hotmail.com
Korea: Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: keast@soback.komet.nm.kr. • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: esperant@unitel.co.kr.
Kostarika: Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto miaumiau@sol.racsa.co.cr.
Kroataj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: mbelosev@public.SRCE.hr • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: orbispictus@iol.it.
Latva kaj litova: Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: stralaim@takas.lt.
Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: esperlu@geocities.com
Nederlandaj: Libro-Servo Esperanto Nederland, Mamixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278).
 • UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: uea@inter.nl.net.
Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: esperanto@online.no
Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: gwenda.s@ihug.com.nz
Portugala: PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C-A, P-1500 Lisboa. R: ap.esperanto@clix.pt
Pola: Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.
Rusa: Halina R. Gorecka, ab.ja 1248, RUS-236039 Kaliningrad, Ruslando. R: sezonoj@yandex.ru
Slovenaj: Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: orbispictus@iol.it. • Jovan Mirković, Mima 5, SLO-2000 Maribor. R: j.mirkovica@siol.net
Sud-Afrika: Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: cbeckford@ppc.co.za.
Svedaj: Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.
Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.
Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: elna@esperanto-usa.org
Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: jebachrich@hotmail.com

aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio



- Rimedoĵ tute senkostaj:**
 - 1.1. Se vi havas kurantan konton ĉe FEL, kiu estas kredita, simple petu ke ĝi estu debetita.
 - 1.2. Se vi havas konton ĉe UEA, kiu estas kredita, sendu ĝirilon. La kontokodo de Flandra Esperanto-Ligo ĉe UEA estas fela-x.
 - 1.3. Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran bankĉekon. En tiu okazo la valuto devas esti la usona dolaro.

2. Rimedoĵ kiuj estas senkostaj en la alvenlando (Belgio) sed eble kostas en la forirlando (via lando):

2.1. Petu vian poŝtoŝefcejon pri internacia poŝtmandato je nomo de Flandra

Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

2.2. Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, eŭroj, tratitan je belga banko. Se la bankĉeko ne estas tratita je belga banko, aŭ se ĝi estas en alia valuto ol EUR, aldonu la egalvaloron de 10,5 EUR.


2.3. Petu vian bankon pagi al KBC Antwerpen Belgio, SWIFT-kodo "KREDBEBB", por konto 402-5510531-55.

2.4. Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili estas akireblaj en la plimulto de la poŝtoŝefcejoj de la mondo. Unu kupono, nur maldekstre stampita de la poŝtoŝefcejo, aŭ tute ne stampita, valoras 0,79 EUR.

3. Rimedoĵ kiuj kostas en la alvenlando:

- 3.1. Se vi posedas kreditkarton Eurocard, Visa, Access, Fujicard aŭ Mastercard, eblas pagi citante la numeron kaj la validadaton de la karto. Tiuj kiuj volas uzi PGP-ĉifradon por sendi la donitaĵojn, povas peti la publikan ŝlosilon de FEL per simpla retpoŝto. De pagoj per kreditkarto subtrahiĝos 0,62 EUR + 2,25% pro administraj kostoj.
- 3.3. Se vi havas poŝtĉekkonton, vi povas pagi al konto n-ro BE66 0000 2653 3843 de Flandra Esperanto-Ligo. Aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj.

Por limigi la bankkostojn, vi povas pagi pli altan sumon. La tro pagita mono eniros konton vian, pri kiu vi povas disponi por estontaj mendoĵ.





Estimataj gelegantoj,

Sporto jam delonge (eble ĉiam) havas ankaŭ komercan dimension, sed lastatempe, laŭ mia impresoj, ĝi degeneris komplete al nura varo. En Germanio privatulo, posedanto de komercaj televid-kanaloj, aĉetis ĉiujn rajtojn por ekskluzive elsendi ludraportojn de tutlanda piedpilka ligo. Por profiti laŭeble multe per intermetitaj reklamoj, li translokis la programon el malfrua posttagmezo al vesperaj horoj, kiam en aliaj kanaloj oni montras popularajn programojn; tiel li esperis forpreni de aliaj televidstacioj reklamenspezojn. Sed la publiko reagis rifuze: je tiu horo oni ne volis aĉeti la varon piedpilko sed preferis aliajn amuziĝojn. Sekve falegis la nombro de spektantoj, reklamantoj grumblis kaj la miskalkulinto devis reloki la elsendojn. Mono kaj profito ludas grandegan rolon en preskaŭ ĉiuj sportoj: futbalistoj estas vendataj kaj aĉetataj per milionoj; tenisludantoj enkasigas gigantajn sumojn kaj stiristoj de formulo 1, dum horoj idiote veturantaj en raketaŭtoj cirkle kiel ĉevaloj en cirka areno gajnas pli multe ol naftoŝejkoj. Do, se ni volas aperigi artikolojn pri sporto en nia revuo, ĉu ne la rubriko „ekonomio” estus taŭga? Tamen, ekzistas ankaŭ aliaj sportoj kaj sportistoj, pri kiuj valoras raporti, ĉar en ties fokuso ne troviĝas mono. Pri tiaj homoj pensas Grigorij L. Arosev, proponante novan rubrikon „sporto”. Dependos ankaŭ de vi, ĉu la ideo realiĝos: sendu kontribuojn al li aŭ atentigu pri konvenaj temoj. Lian adreson vi trovas en la listo de redaktoroj en la kolofono.

Sincere via Stefan MAUL

leteroj	4
el mia vidpunkto	5
- Murdi je nomo de dio	
politiko	6
- EŬROPA UNIO: Nunaj nanoj: kiel kunvivi kun giganto? ▶	
- INTERNACIAJ RILATOJ: Pace dancante	
- ĈINIO: Aparta partio	
- HUNGARIO: Survoje al EU	
ekonomio	10
- ALBANIO: Amasa elmigrado	
- UKRAINIO: La origino de la ukraina mono	
- ĈINIO: Bona ŝanco por baldaŭa aliĝo al MOK	
- POLLANDO: Kapro pli bona ol monhelpo	
moderna vivo	13
- INFANLUDOJ: Perdita paradizo	
- AŬSTRIO: Peza ĝojo	
- LIBERA ESPRIMADO: Ne preta por la pretero	
spirita vivo	15
- NEDERLANDO: Samseksemo kaj islamo	
turismo	16
- BULGARIO: Pitoreska loko ▶	
- KROATIO: Cavtat - renovigita perlo apud Dubrovnik	
scienco	18
- ENERGIO: Astronomiaj nombroj pri energio en la mondo (Kovriilo)	
- MALLONGE: Patrino lakto - sveltaj adoleskuloj ▶	
- Drinkado, genetiko kaj kormalsano	
hobio	21
- FINNLANDO: Fiŝkapti ekscite	
arto	22
- KINO: Dek tri tagoj ▶	
- POLLANDO: Krakovaj signaloj	
novelo	24
- de István Ertl: Jarmilŝanĝo	
libroj	25
informoj de l' MONATO	29
ŝerco & satiro	30



Dona, dona, dona ...

La letero „Holokaŭsto” (MONATO, 2001/5, p. 4) memorigas al mi la tre iamajn tempojn, kiam iuj popoloj ĝoje prezentis al siaj misdioj la sangajn homoferojn, en kiuj pereis multaj junuloj kaj junulinoj ... La moroj de la mondo evoluis, kaj bestoj anstataŭis la gejunulojn. Sed ĉie kaj ĉiam la plej grandaj oferoj restas la plej sanktaj. Sendube la malnova dio Mamono reviviĝas kaj estas nuntempe pli kaj pli adorata. Ŝajnas ke tiu misdio estas pli postulema ol la aliaj, ĉar fanatikuloj bruloferas por li tiom da sanaj bestoj. Laŭ sia difino, „oferi” signifas „fordoni ion valoran, por akiri ion alian, kion oni rigardas kiel pli valoran” (PIV). Ĉi-okaze, temas pri mono, kompreneble ...

Se la EU-ordonoj estis tiel kruelaj por la brutaro, oni povus pensi ke ili estas multe pli mildaj por la kokinoj ovellasemaj. Efektive, EU-direktivo deklaras ke ĉiuj dombestoj rajtas havi konvenan loĝejon, sanan nutraĵon kaj taŭgan zorgadon, kiujn necesigas iliaj naturaj bezonoj kaj specifa aktiveco ... Sekvas du ĉapitroj kun precizaj instrukcioj ... Sed la komforto de la kokinoj estas rekomendata nepre ĉar ili produktas ovojn, kaj validas do nur dum ili produktas ovojn. Poste ili finiĝos en kaserolo, kaj pri tio neniu ĉagreniĝos.

Fakte, ankaŭ tiu direktivo de EU, pli milda, similas al la unua, pli kruela. Ĝi celas akiri monon. La dombestoj estas sklavigitaj por ekskluziva servado al la homaro, kiu havas sur ili ĉiujn rajtojn. Neniam la kompatindaj dombestoj estos tute liberaj kaj feliĉaj kiel birdo aera.

Jean BERTRAND, Francio

Duone malplena glaso

La artikolo *Lernu la germanan!* de Stefan Maul (MONATO, 2001/8, p. 6) estis tre interesa, ĉar ĝi pritraktas vaste diskutatan problemon kredeble en la tuta okcidenta Eŭropo. Mi timas, ke la aŭtoro vidas nur duone malplenan glason. Apud enmigrintoj, kiuj „ne havas intereson lerni la germanan”, mi konas diversajn kazojn de dua-generaciaj (eĉ de unua-generaciaj) enmigrintoj en Germanion, kies ĉefa lingvo estas la germana. El la sperto, oni ŝajne povas eltiri la fakton, ke ju pli oni devenas el foraj lando kaj kulturo, kaj ju pli amasa estas tia enmigrado, des pli da generacioj oni bezonas por asimiliĝi al la majoritata socio.

La ĉefa kaŭzo tamen verŝajne ne kuŝas en la enmigrintoj mem, sed en la ĉirkaŭanta socio, kiu daŭre signaladas ilin kvazaŭ fremdulojn. En la kazo de Germanio estas vaste konate, ke germandevenaj kazaĵoj tute ne konantaj la germanan multege pli facile ricevas germanan civitanecon ol turkidoj naskitaj en Germanio. Kiu instigo por asimiliĝi al socio ne akceptanta onin?

Aliflanke, kulpas ankaŭ okcident-eŭropanoj pri tio, ke ili postulas plenan asimiliĝon. En aliaj mondopartoj, estas pli normale, ke diversaj lingvoj kaj nacioj paco kunvivu en la sama teritorio. Verŝajne iom post iom necesos ŝanĝi la starpunkton al pli bunta, diversa, kelklingva, plurkultura socio. Eble Eŭropa Unio helpas al tio.

Fine, permesu komparon. Se 80-miliona Germanio ne sukcesas gluti milionon da turkoj kaj kurdoj, kio estus pri la miliono da andaluzoj en 6-miliona Katalunio (kie 6 milionoj kompreneble inkluzivas ilin) – kaj ne memstara Katalunio tute ne havas plenan leĝorajton por altrudi sian lingvon al novvenintoj? Eble germanoj devus esplori aliajn eduksistemojn, kiel tiu de „lingva mergiĝo”, glate funkcia de la komenco de la 80aj jaroj en Katalunio en kvartaloj, kie 70 % de la lernantoj ne estas katalunlingvaj kaj plej ofte tute ne komprenas la katalunan alvenante en la lernejon.

Hektor ALOS I FONT, Katalunio

Rotario helpas

En sia artikolo pri la infana paralizo (poliomjelito) (MONATO, 2001/8, p. 21) Evgeni Georgiev prave notis la kontribuon de Rotario al la tutmonda kampanjo kontraŭ tiu malsano. Sed permesu ke mi raportu kelkajn pliajn detalojn. *Rotary International* estas – kune kun *Lions International* – la plej granda internacia organizaĵo por amikeco kaj servado. Ĝi nombras preskaŭ 1 200 000 gemembrojn apartenantajn al 30 000 kluboj en 160 landoj. En 1985 *Rotary* lanĉis sian programon *PolioPlus* kiu ĝis nun disponigis 380 milionojn da dolaroj kaj mobilizis centojn da miloj da volontuloj por elimini tiun kripligan malsanon ĉefe pere de vakcinado. Pli ol du miliardoj da infanoj jam estas vakcinitaj, kaj la nombro de landoj infektitaj de poliomjelito falis de 125 ĝis 30. La Ĝenerala Direktoro de la Monda Organizaĵo pri Sano, s-ino Gro Harlem

Brundtland, publike deklaris ke sen la iniciato de Rotario ŝia Organizaĵo verŝajne ne estus entrepreninta la planojn por elradikigi tiun teruran malsanon.

Mi aldonu ke nia fratina organizaĵo, *Lions International*, laŭnombro iom pli granda ol Rotario, dum jardekoj koncentris siajn energiojn por mondskala luktado kontraŭ la blindeco kaj aliaj okulaj malsanoj.

Eskil SVANE, Francio

N.d.l.r.: Eskil Svane estas prezidanto de Rotaria Amikaro de Esperantistoj.

Terorismo kaj senkulpeco

La teroristoj, kiuj stiris la aviadilojn kontraŭ la novjorkaj nubskrabuloj, plenumis sian taskon decideme, inteligente kaj brave, se oni provas rigardi la okazintaĵon de ilia vidpunkto. La ŝtatoj de la mondo kvazaŭ sidas ĉirkaŭ la sama manĝotablo, aŭ ĉe malsamaj tabloj en la sama tuttera restoracio. Iuj konsideras sin elito, ĉar ili sukcesis havigi al si la plej bonajn manĝaĵojn kaj seĝojn. Ili parolas pri konkurenco kaj profitoj, sed ili ne agnoskas, ke ies profito en la materia mondo ĉiam estas alies malgajno. Ili ne povas krei riĉaĵojn el vakuo. De kie kaj el kio la riĉo estiĝas? La elito imagas sin bonuloj, se ili jen kaj ĵetas ostojn kaj almozojn al la mizeruloj sub ilia tablo kaj apud ĝi. Ili opinias, ke ilia ekonomia sukceso igas ilin pravaj pri ĉio: religio, milito, financoj, arto ... La malkontento de la apudtabluloj kaj subtabluloj kreskas de tago al tago. Fine aperas iaj Robin Hood-oj, kiuj faras sian eblon por ŝanceli la maljustan strukturon de la mondo. Nur senfina malespero kaj religio povas doni al ili la bezonatan kuraĝon. Sed kuraĝaj ili estis, ne timuloj, kaj supozeble ili agis laŭ siaj kredo kaj konscienco. Sonas strange kiam Bush nomas ilin senvizaĝaj timuloj kaj minacas per fumo eligi ilin el iliaj truoj kaj venĝi. Tia romaneska lingvaĵo tute ne taŭgas por komprenigi la situacion al la cetera mondo, sed simplulojn ĝi povas imponi: Kiel decidema, agema kaj forta nia ĉefo estas kaj kun li, ni! Kelkaj tamen opinias, ke la ĉefo ne deziras – aŭ ne scias – ĝisfunde analizi la multifacetan situacion sed reagis primitive, naive kaj nur de mallarĝa vidpunkto.

La ununura rimedo kontraŭ similaj okazintaĵoj estas edukado al paco kaj vera demokratio, edukado al dialogo inter kulturoj kaj religioj kaj, antaŭ ĉio, egalrajteco ĉe la tutmonda manĝotablo.

Raita PYHÄLÄ, Finnlando

Murdi je nomo de dio

„Alaho estas granda!” jubilis homoj en islamaj landoj kaj teroristego Osama ibn Laden dankis al sia dio pro la barbara murdo de miloj da homoj en Usono fare de memmortigaj atenculoj. Tiuj martiroj tuj eniris la paradizon, ĉiu el ili nun estas dorlotata de 70 virgaj junulinoj. Kia kruela dio devas esti, je kies nomo krimuloj brutalege amasmurdas kaj sekve meritas martirecon?

En tre multaj sangaj konfliktoj aktualaj religio estas enplektita. En Nord-Irlando katolikaj kristanoj murdas protestantajn kristanojn kaj inverse. En balkanaj landoj katolikaj kroataj buĉis ortodoksajn serbojn kaj islamajn bosnianojn, serboj murdis kroatojn kaj islamajn bosnianojn kaj albanojn, albanoj buĉas kristanajn serbojn kaj makedonojn. En Niĝerio islamanoj kaj kristanoj murdas sin reciproke, ekde kiam islama punjuro validas ankaŭ por kristanoj. Interreligiaj bataloj okazas en Sudano kaj Jemeno, en Egiptio, Indonezio kaj Filipinoj. En tiel nomata Proksima Oriento palestinaj memmortigaj atenculoj murdas judojn, Israelo murdas islamanojn. En kaŭkazaj landoj militas islamaj geriloj kontraŭ (kristanaj) rusoj, rusa prezidanto Putin persekutas islamajn ĉeĉenojn kaj ricevas benon de l' rus-ortodoksa patriarko; en Rusio ĉeĉenaj teroristoj bombe detruas domojn kun centoj da loĝantoj.

Religia militemo

Antaŭ pli ol unu jardeko ni povis havi la iluzion, ke la mallumaj epokoj de interreligiaj konfliktoj kaj militoj – kun malmultaj esceptoj, ekzemple en Nord-Irlando – definitive pasis. Ni havis la iluzion, ke la homaro lernis el la kruelaĵoj de persekutoj de kristanoj fare de Romio, el la krucmilitoj de kristanoj kontraŭ islamanoj, el la tridekjara interkristana milito en Eŭropo kaj laste el la nazia ekstermado de judoj. Sed intertempe adeptoj de diversaj dioj pli kruele ol iam ajn murdas adeptojn de aliaj dioj. Kiel montras la supra (nekompleta) listo de sangaj konfliktoj, la plej militema dio de grandaj religioj nun ŝajnas esti tiu de islamo. Kristanismo plejparte evoluis al relative humana nivelo; nur en malmultaj kristanaj landoj ne regas paco. La universale agnoskatajn homajn rajtojn ni dankas – ne nur, sed ankaŭ – al principoj de kristanismo, laŭ kiu antaŭ dio ĉiuj homoj estas egalaj. Tio, kun demokratio, kondukis al bonfartaj kaj relative socialaj kaj liberaj socioj.

Primitiva fundamentismo

Islamo, apud judismo kaj kristanismo la tria monoteisma religio, ne nur ne evoluis en tiun direkton al pli humana socio, sed male en tre multaj mondregionoj refalis en mezepokan obskurantisman, reage al superreganta okcidenta (t. e. kristana)

kulturo. Primitiva fundamentismo kreskis kaj plu kreskas en timige multaj islamaj landoj, kiuj spertas nun simile kruelan sorton kiel homoj en Eŭropo dum la menciita tridekjara milito: islamaj fundamentalistoj sange persekutas siajn samkredanojn en Alĝerio, en Irano kaj precipe en Afganio. Tie talibanoj (korandisĉiploj) establis obskuran reĝimon, arkaikan teokration kun malhomaj leĝoj.

Kio okazis pri islamo, kial ĝi – iam altkultura kun sciencaj korifeoj – ne nur stagnas sed refalas? Ŝajnas, ke islamo estas nekapabla reformiĝi kaj evolui kiel ekzemple kristanismo. Ĝi rigidiĝis en siaj principoj, precipe en tiaj kiuj malhelpas progreson. Islamo restis feŭda, demokratio estas absolute fremda al ĝi; unu duono – la viroj – regas, la alia duono – virinoj – estas subpremata, sklavigita (ĝis la unika fenomeno de haremo, religie benita bordelo). Islamo ne pretis akcepti novajn sciencajn ekkonojn kaj uzi ilin por la bono de l' homoj. Islamaj landoj postrestis laŭ multaj

aspektoj; ne mirigas, ke inter la plej mizeraj ŝtatoj troviĝas precipe islamaj, ke inverse neniu islama lando estas riĉa (ankaŭ en naftoŝtatoj ne bonfartas la amaso).

Satano Usono

Kompreneble estis multaj faktoroj, kiuj kondukis al ekstrema fundamentalisto, kies manifestiĝon ŝokite ni spertis en 1979, kiam radikala Ajatolo Komejni ekregis en Irano – antaŭe unu el la iom evolu-intaj islamaj ŝtatoj pro okcidenta influo sub (diktatora!) ŝaho. Tiam fortiĝis ankaŭ la islama malamo kontraŭ „Satano Usono”, kiu fariĝis precipa celo de atakoj fare de

ekstremistoj, ĝis la nigra 11a de septembro 2001, kiam islamaj fanatikuloj amasmurdis en Novjorko kaj Vaŝingtono.

Nun oni gurdas la aserton, ke islamo (kio signifas „paco”) kiel tuta ne estas malamika al okcidento kaj ke tiel nomata „batalo de kulturoj” ne okazas, ke islamo malpermesas memmortigon kaj terorisman, precipe kontraŭ nesoldatoj, ktp. Sed por organizi, prepari kaj realigi la barbaraĵojn de la 11a de septembro ne sufiĉis grupeto da teroristoj, por tio necesis miloj da homoj, kiuj dum jaroj kaŝe povis aranĝi (kaj financi) ĉion. Tio ne eblus, se la islama medio ne grandparte simpatie protektus kaj subtenus tiujn fanatikulojn, se en ĝi ne regus fortega tendenco de militemo, malamikeco kaj maltoleremo al alireligianoj.

Eble, espereble la ŝoko de tiu nigra septembra tago instigos la islamon reformiĝi, kunvoki kvazaŭ sian 2an Vatikanan Koncilion. Sed mi rajtas dubi pri reformkapablo de religio, kiu humiligas min senkom-pate deklarante ke mi, kiel kristano, aŭtomate estas malpurulo. Dio gardu nin kontraŭ tia islamo!

Stefan MAUL



Nunaj nanoj: kiel kunvivi kun giganto?

La Eŭropa Unio (EU) baldaŭ estos preta ricevi novajn membrojn, ĉefe el orienta Eŭropo. Tamen unu el la eventualaj 13 novaj aliĝintoj estos Malto, insula nanolando en Mediteraneo. Ĝis nun, nur unu alia nanolando aliĝis al EU, nome Luksemburgo, unu el ĝiaj kunfondintoj. Kio pri la kvin aliaj eŭropaj nanolandoj? Ĉu ankaŭ tiuj aliĝos – kaj kiel aliĝo efikos sur la lingvo-politikon de la unio?

Post Luksemburgo, la plej malgrandaj sendependaj landoj en Eŭropo estas Andoro, Malto, Liĥtenŝtejno, San-Marino, Monako kaj – la plej malgranda – Vatikano. Krom Malto, neniuj el tiuj landoj petis aliĝon al EU. Liĥtenŝtejno, kiel Svisio, estas membro de Eŭropa Asocio pri Libera Komercio: jam de 1918 ĝi estas forte ligita al Svisio. Ekzemple, Svisio funkciigas ĝiajn telefonan kaj poŝtan servojn, kaj Liĥtenŝtejno uzas svisan valuton. Liĥtenŝtejno konsideras la union, nur se Svisio aliĝus. La du landoj estas kontentaj resti en komuna ekonomia zono sen perdo de politika sendependeco.

Seksaj orientiĝoj

Monako kaj Vatikano ne povos aliĝi

al EU. Vatikano ĵus kondamnis „malpian” EU-ĉarton pri bazaj rajtoj: la ĉarto promesas egalajn rajtojn al ambaŭ seksoj kaj por ĉiuj seksaj orientiĝoj. Por aliĝi, Vatikano devus akcepti la ĉarton. Krome, EU rigore postulas demokration: en Vatikano la papo plenpovas, kaj la sola elemento demokrata okazas, dum estas elektata nova papo. Ankaŭ Monako verŝajne ne sufiĉe demokratas por partopreni en EU. Nacia konsilantaro estas la sola demokrata institucio en Monako, tamen neelektita princo rajtas malakcepti ajnan leĝon aprobitan aŭ eĉ proponitan de la konsilantaro. Krome, nur 16 % de la loĝantoj de Monako estas civitanoj kun voĉdonrajto. Por membriĝi en EU, kaj Vatikano kaj Monako devus profunde ŝanĝi siajn politikajn strukturojn.


Restas Andoro kaj San-Marino. Ambaŭ jam subskribis interkonsenton pri dogana unio kun EU. Tio signifas, ke ne ekzistas tarifoj inter ili kaj EU; ankaŭ ke ili subtenas samajn tarifojn kun eksteraj landoj. Laŭ reprezentanto de Andoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN), Andoro ankoraŭ ne oficiale konsideris aliĝon. Laŭ reprezentanto de San-Marino, la nova registaro ĵus proponis diskuti aliĝon.

Naciaj simboloj


San-Marino, Vatikano, Monako kaj Andoro, kvankam ne aliĝintaj al EU, tamen uzas valutojn, kiujn la eŭro baldaŭ anstataŭos. Efektive ili troviĝas en la eŭro-zono kaj baldaŭ uzos eŭrojn. Tiuj ĉi landoj, krom Andoro, tradicie fabrikas



Andorro: la ĉefurbo, Andorra la Vella.



San-Marino: unu el la tri famaj montoj.





Laŭ Vatikano, la subskribintoj de la EU-ĉarto agis „malpie”, ĉar EU promesas egalajn rajtojn al samseksemuloj.

lirajn aŭ frankajn memor-monerojn: EU permesos al ili fari ankaŭ eŭro-monerojn kun naciaj simboloj.

Kiam la orient-eŭropaj landoj eniros la union, iliaj lingvoj aŭtomate oficialiĝos: tradukendos EU-dokumentoj en eventuale 10 novajn lingvojn. Tamen la lingvoj de nanolandoj ne havas egalajn rajtojn. La malbone konatan luksemburgan lingvon, *Letzebuergesch*, EU ignoris ekde la komenco. Tamen la lingvo estas vaste uzata, ankaŭ en elementaj lernejoj, kaj estas unu el tri oficialaj lingvoj.

La malta estas semida lingvo, kiu similas la araban, sed kun multaj vortoj prenitaj de la itala. Ĝi kaj la angla estas oficialaj lingvoj de Malto. EU intencas ignori la maltan kaj kalkuli Malton kiel plian anglalingvan landon. EU argumentas, ke ĉiuj maltanoj parolas la anglan,

sed ŝajnas, ke maltanoj ofte intermiksas kaj konfuzas la du lingvojn.

Amuza problemo

Se Liĥtenŝtejno, Monako aŭ San-Marino decidus aliĝi al EU, supozeble estiĝus neniu lingvo-problemo: iliaj oficialaj lingvoj estas respektive la germana, la franca kaj la itala. Tamen la popoloj de la tri landoj parolas neoficialajn dialektojn: la alemanan, la monakan kaj la romanjan. Kaj estus kreita amuza problemo, se Vatikano iel sukcesus membrigi en EU: Vatikano rajtus postuli, ke ĉiuj dokumentoj estu tradukitaj en ĝian oficialan lingvon, la antikvan latinan.

Tamen, se Andoro aliĝus al EU, estiĝus neniel amuza, sed serioza problemo: ĉu aldoni la katalunan al la oficialaj EU-lingvoj? La kataluna estas la sola oficiala lingvo de Andoro, kvankam multaj andoranoj parolas la francan aŭ la hispanan. Se EU kontraŭus oficialigon de la kataluna, verŝajne katalunoj en Hispanio kaj Francio kolektus pro la perdita eblo plivalorigi sian lingvon. Inverse, eble Hispanio kaj Francio protestus pro plenrajtigo de „dialekto”, kiun ili ne subtenas. Ankaŭ aliaj landoj eble timus precedencon oficialigi tiel nomatan „regionan” lingvon.

Resume: en EU ne ekzistas diskriminacio kontraŭ nanolandoj, nur tamen fakte kontraŭ la lingvoj de Luksemburgo kaj Malto kaj teorie – se aliĝus la aliaj nanolandoj al EU – kontraŭ ankaŭ ties lingvoj. Ĉu elpenseblas pli racia solvo de la lingvo-problemo – eble solvo proponita de pola kuracisto en la 19a jarcento ... ?

Thomas ECCARDT



Luksemburgo: Statuo de Vilhelmo 2a.

Monato

KONEKTIĜI

- ▶▶ **KOLOFONO**
La bazaj informoj pri MONATO.
- ▶▶ **SPECIMENOJ**
Specimenaj tekstoj el MONATO.
- ▶▶ **TARIFO**
Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.
- ▶▶ **PERANTOJ**
Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.
- ▶▶ **ABONILO**
Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!
- ▶▶ **REDAKTOROJ**
Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.
- ▶▶ **MANUSKRIPTOJ**
Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.
- ▶▶ **KONVENCIOJ**
Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.
- ▶▶ **ANONCOJ**
Anonctarifoj de MONATO.
- ▶▶ **INDEKSOJ**
Indeksoj de MONATO por trovi aperintajn artikolojn.
- ▶▶ **RADIO POLONIA**
Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.
- ▶▶ **ETIKO**
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoskita de MONATO).

24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>

Pace dancante

Plifortigos rilatojn inter Turkio kaj Grekio la ministro pri eksteraj aferoj de Turkio, Ismail Cem, kaj lia greka sampostenulo, Jorgo Papandreu.

La plibonigotaj rilatoj celas aparte transporton, kulturon kaj sanprotektadon. Krome la du ministroj decidis starigi inter si rektan telefonleoneon. Tiel la renkontiĝo de la du ministroj en Sisam kaj Kusadasi signis gravan paŝon en la interrilatoj de ambaŭ landoj.

Ĉiel oni rimarkas pli amikan etoson. Ekzemple, rilate tertremojn ambaŭ landoj ekstudos kaj esploros sismologion; ankaŭ estas decide estigi reciprokan helpon okaze ne nur de tertremoj sed ankaŭ de inundoj kaj arbarincendioj. Plue, ambaŭ ministroj volas favorigi vojaĝadon de siaj civitanoj reciproke al Grekio kaj Turkio. Papandreu notis, ke tiurilate li devas konsiliĝi ankaŭ kun siaj partneroj el la Eŭropa Unio, kion li faros kiel eble plej baldaŭ.



La greka ministro pri eksterlandaj aferoj, Jorgo Papandreu, dancas antaŭ turka publiko.



Altaj aŭtoritatuloj de Turkio kaj Grekio tenas enmane pac-kolombojn.

Dum la vizito Papandreu kantis kaj dancis, tiel mesaĝante al grekoj kaj al turkoj, ke li ja volas plifortigi amikecon inter la du popoloj, kaj ke, kvankam naskiĝinta en Usono, li tamen restas greko. La du ministroj estis varme akceptitaj ankaŭ en Ĉarŝio, kie oni flirtigis naciajn standardojn de Grekio kaj Turkio. Ismail Cen surmetis amuleton sur ambaŭ, por ke ilin ne damaĝu la „diabla okulo”.
Iliriana MEZINI

ĈINIO

Aparta partio

La 1an de junio 1921, 12 influhavaj ĉinoj malkaŝe kunvenis por fondi la Ĉinan Komunistan Partion. Tiam la ĉina popolo suferis pro militoj – invadis la japana armeo – kaj pro malriĉeco. Por liberigi ĉinojn multaj komunistoj dum 28-jara luktado perdis la vivon, ĝis finfine la 1an de oktobro 1949, estis fondita la Ĉina Popola Respubliko.

En la unuaj jaroj de la respubliko pro industria malforto eĉ najloj, sapo, alumetoj kaj aliaj simplaj produktaĵoj devis esti importataj; ankaŭ suferis la popolo de tempo al tempo pro malsato. En 1978 la Ĉina Komunista Partio ekaplikis politikon de reformado kaj de pordo-malfermo. Ekde tiam floras entreprenoj urbataj kaj vilaĝaj: kamparanoj eklaboris en la urboj, kaj enfluis eksterlandaj investaĵoj. Multaj kamparanoj nun posedas poŝtelefonon, motorciklon, fridujon, k.s.: kelkaj eĉ posedas aŭton. Memevidente urbanoj pli riĉas ol kamparanoj: pli grandas en urboj la ebloj riĉiĝi, ekzemple pro turismo.

Ankaŭ la 1an de julio ĉi-jare festis ĉinoj diversmaniere la 80an datrevenon de la Ĉina Komunista Partio. Preskaŭ ĉiu ĉino opinias, ke sen la partio la nuna vivo ne tiel bonus kaj belus.

XU Jinming / pg

HUNGARIO

Survoje al EU

Abrupte oni komencis konstrui novajn ŝoseojn en Hungario. En la lastaj tri jaroj estis konstruita ne unu kilometro da ŝoseo, malgraŭ antaŭelektaj promesoj de la registaro. Venontjare okazos novaj elektoj, do estas tempo lasta por plenumi la promesojn.

Komence estas konstruataj du gravaj pontoj trans Danubo. La unua situas en la sudo, la dua en Esztergom [éstergom], kie la ponto estas detruita dum la dua mondomilito. Tiu ĉi nova ponto fariĝos trapasejo inter Hungario kaj Slovakio: pro tio ĝi estas komune konstruata. Interese estas, ke entreprenas la laboron hungaraj firmaoj. La ĉefministro, Viktor Orbán, rifuzante pruntojn de la Internacia Mona Fonduso, diris, ke transnaciaj kompanioj foje tro multekoste laboras.

Dupartiismo

Kritikis eksterlandanoj ne nur la hungarecon de la ŝoseo-konstruado. Oni atentigis pri la sorto de ciganoj kaj pri la fakto, ke en la ŝtata televido apenaŭ aperas la opozicio. Malgraŭ tio, Hungario atingis rimarkindajn sukcesojn dum aliĝaj pritraktadoj al Eŭropa Unio (EU). La industria produktado kaj la valoro de la forinto daŭre kreskas, kaj oni esperas eniri EU-on en 2004.

En la parlamento satelitaj partioj nuliĝis, tiel ke restas unusola rivalo de



Orbán: hungara ĉefministro.

la registaro: la socialistoj. Krome menciindas la dekstrema partio MIEP. Orbán senĝene akceptas voĉojn de MIEP: kritikinte la dekstremulon Haider en Aŭstrio, EU ne kuraĝas kritiki la kabineton de Silvio Berlusconi [silvjo berlusconi] en Italio, kaj do Orbán sentas sin sufiĉe imuna kontraŭ EU-kritiko. Do Hungario preferas proksimajn kaj dekstremajn Aŭstrion kaj Italion ol pli forajn, iom maldekstremajn Germanion, Francion kaj Brition.

Karlo JUHÁSZ

Ĉie
laŭdata

Esperanto

SENDEPENDA

SUBTEKSTE

PAROLIGAJ KAJ PERFEKTIGAJ
EKZERCOJ

d-ro Paul Gubbins

Flandra Esperanto-Ligo

Antverpeno 1999

Prezo: 12 EUR

ALBANIO

Amasa elmigrado

La grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝigoj en la landoj de orienta Eŭropo estas karakterizitaj i.a. de amasa elmigrado. Tiu fenomeno ricevis bibliajn dimensiojn en malgranda sed ekstreme malriĉa kaj antaŭe subpremita Albanio.

Vladimir Misja, profesoro pri ekonomiko de la Universitato de Tirana kaj de la Instituto por Mildigo de Malriĉeco, estas pristudinta tiun fenomenon. Jen resumo de liaj konstatoj.

Elmigrado kaj enlanda labormerkato

La amasa, nekontrolita migrado el Albanio al Italio, Grekio kaj aliaj landoj influis notinde la senlaborecon enlande. En la jaro 1998, kompare al la jaro 1990, la senlaboreco malpliigis je 57,7 % (85 000 personoj), dum la nombro de loĝantoj je laborkapabla aĝo kaj la nombro de dungitoj dum tiu periodo respektive falis je 0,5 % (9000 personoj) kaj 24,1 % (344 000 personoj). Sen elmigrado la senlaboreco atingus tre altajn nivelojn, proksimume 500 000 personojn.

Stabiliga faktoro

La valuto sendita de elmigrantoj variis de 107 milionoj da usonaj dolaroj (USD) en la jaro 1991 ĝis 500 milionoj da USD en la jaro 1998. Tio egalas al kvinono de la nacia produkto en Albanio. Ĝi superis dufoje la eksportajn enspezojn kaj pli ol kvarfoje la rektajn investaĵojn enlandajn.

Estas menciinde, ke la ŝtata buĝeto proksimume egalas al la mono sendita de elmigrantoj (550-650 milionoj da USD jare). Dum la periodo 1993-1997 la monsendaĵoj de elmigrantoj reprezentis ĉ. 73,5 % de la deficino de ekstera komerco de Albanio kaj estis la ĉefa regulilo por la pagobalanco. La sumoj senditaj de elmigrantoj en Albanion ege superas, je persono, tiujn senditajn en Jugoslavion, Turkion aŭ Grekion.

Familioj, kiuj havas membrojn laborantajn eksterlande, certigas al si enspezojn 2,5-oble pli altajn ol la ceteraj.

Laŭ enketado farita antaŭ nelonge, 27 % de ĉiuj aĉetoj en la familio estiĝis per la mono ricevita de elmigrantoj. Kompreneble, tiu mono estis same faktoro por plimildigi la malriĉecon enlande.

Ankaŭ la investoj rilatas al la mono ricevita de elmigrantoj. Tiel, en la ĝenerala strukturo de la monfontoj por financado de malgrandaj kaj grandaj entreprenoj, ĝi konsistigas ĉ. 17,5 %. Laŭ studoj faritaj en kelkaj landoj, 1 USD da investoj el la mono de elmigrantoj certigas plialtiĝon de la ĝenerala socia produkto je 2,3 USD. Tio ankaŭ validas en Albanio.

Elmigrado influis la bankan sistemon, plialtiginte notinde la mondeponojn. Laŭ enketado, du trionoj de albanaj elmigrantoj intencas investi sian monon en sia devenlando, dum la cetero deponas la monon en la akceptolando.

Mankas taŭga politiko

En Albanio estas Ministrejo pri Laboro kaj Elmigrado, kiu dekomence deklaris, ke ĝi ellaboros mallongtempajn kaj longtempajn migradpolitikon. Estas fondita ankaŭ Nacia Komitato por Loĝantaro, kiu celas politikon demografian, konforme al aktualaj ŝanĝigoj enlande.

La najbaraj ŝtatoj Grekio kaj Italio, kiujn trafis plejmulte la amasa albana elmigrado (oni taksas je 500 000 la nombron de albanaj elmigrantoj en Grekio kaj je 200 000 en Italio), ankoraŭ ne estas ellaborintaj taŭgan politikon.

Italio traktas la aferon je aspekto polica. Komence ĝi instalas policajn fortojn en sia sudo, poste apud la albana marbordo, kaj laste en la albana teritorio.

Grekio, laŭ la oficialaj donitaĵoj, de 1991 ĝis 1996 forpelis en Albanion 1

'La elmigrado kaŭzis malpliigon de familioj, ĉar multaj elmigris tutfamilie'

147 000 elmigrantojn (kiuj multfoje kaŝe reeniras Grekion...) pere de siaj policaj fortoj, danke al operacio je koda nomo „balailo” (kiu aktiviĝas kiam la rilatoj inter ambaŭ landoj malboniĝas). La operacio „balailo” servas ankaŭ kiel reguliga tampono por la greka ekonomio.


La formoj de integriĝo

Estas du ĉefaj integrigaj politikoj: asimilada (nuligo de diferencoj kulturaj kaj lingvaj inter enlandanoj kaj enmigrantoj, konservante nur simbolecan etnecon), kaj plurkultureca (ebligante al elmigrantoj plukonservi siajn lingvon, kulturon kaj tradiciojn).

Grekio elstaras per la politiko asimila. Tio pruviĝas ne nur de diskriminacio de albanoj rilate la dungadon kaj pagadon, sed ankaŭ la klerigadon kaj socian agadon de enmigrantoj. Italio kaj aliaj landoj estas pli humanaj tiurilate: leĝigado de la restado, familia kuniĝado, dungado laŭfaka kaj longtempa, helpo por klerigado kaj sanprotektado, ktp.

El enketado farita en Grekio rezultas, ke la infanoj 10- ĝis 15-jaraj parolas ankoraŭ sufiĉe bone (sed ne flue) la albanan. 25 % jam estas forgesintaj skribi kaj legi (temas pri tiuj infanoj enirintaj frue en grekajn lernejojn). El la aĝo-grupo 20- ĝis 30-jara, ĉirkaŭ 30 % estas jam forgesintaj multajn vortojn kaj ne povas konversacii facile.

La albanaj elmigrantoj kutime ne havis la necesajn sciojn pri la lando akceptanta ilin. 87 % de la elmigrantoj konis malbone aŭ parte la akceptontan



landon. Menciindas, ke albanoj pli bone konis Italion danke al televido.

Familioj kaj elmigrado

Enketado farita en la itala urbo Bari inter elmigrintoj el la jaro 1991 montras, ke 75 % el ili estis jam dungitaj en sia hejmlando, sed ke la enspezoj tie estis malbonaj (tiel respondis 68 % el la enketitoj). Do ili elmigris por ricevi pli altan salajron (29 %), por monhelpi al familio restinta en hejmlando (28,4 %), por ekĝui pli bonajn vivkondiĉojn (16,4 %), pro pli bona instrusistemo kaj klereceblecoj (6 %) kaj pro politikaj motivoj (3 %).

Negativaj aspektoj

La elmigrado kaŭzis malpliigon de familioj, ĉar multaj elmigris tutfamilie. Estas en sudo de la lando tutaj vilaĝoj, kie plurestas malmulte da familioj aŭ nur maljunuloj. Pro tio, ofte la agroj restis nekultivitaj kaj la rikoltoj nekolektitaj, ĉar la laborfortoj estis bezonataj en la akceptolando.

Kompreneble, Albanio perdas sian plej bonan laborkapablan forton, kiu estas tre utila por la akceptolandoj. Por la ekonomio de Grekio, lastan jardekon, albanaj elmigrintoj faktoris kiel levilo.

Bardhyl SELIMI

UKRAINIO

La origino de la ukraina mono

Kiam oni parolas pri Sovetio aŭ pri nunaj postsovetiaj landoj, ofte oni subkomprenas, ke ĉie estas uzataj rubloj kiel mono. Sed en Ukrainio jam multajn jarojn ekzistas propra valuto: *hrivna*.

Komence: ornamaĵoj, ne pagiloj

La unuaj moneroj sur la teritorio de Ukrainio aperis en la unua duono de la unua jarmilo. Estis importitaj moneroj: romiaj dinaroj, persaj draĥmoj... Plejparte tiuperiode la moneroj servis nur kiel materialo por prepari virinajn ornamaĵojn, ne por komercaj celoj.

Regula ĉiutaga cirkulado de la mono por komercaj rilatoj aperis nur fine de la 8a jarcento. Ĉefe tiun rolon ludis arabaj moneroj, dirĥemoj, kiujn tiuperiode ĉe ni oni nomis alimaniere: *kuny*, *rezany*, *nogaty*... Estis belaspektaj rondaj, tricentimetraj moneroj. Ili estis praktike sola valuto en antikva Rusio dum kelkaj jarcentoj. Tiu konstanta uzado de la moneroj rezultigis ties malbonstatiĝon kaj plenan netaŭgecon. Rezulte juvelistoj preparadis el ili diversajn ornamaĵojn.

La unuaj hrivnoj: nur por riĉuloj

En la periodo de la dukoj Vladimir (?-1015) kaj Jaroslav la Saĝa (978-1054) jam sentebliis la nesufiĉa kvanto da mono, kaj oni komencis gisi el netaŭgaj moneroj la unuajn hrivnojn. Tiuj estis uzataj ne nur por komercaj celoj inter reprezentantoj de superaj sociaj tavoloj, sed ankaŭ kiel ŝparrimedo. Estis diferencigataj hrivnoj depende de la loko kaj tempo de ilia produktado. La plej malnova kieva arĝenta hrivno pezis ĉirkaŭ



164 gramojn, kio egalas al duono de la bizanca pundo. Pli poste norde de Rusio aperis t.n. novgoroda hrivno, kiu pezis pli ol la kieva – preskaŭ 204 gramojn. Tiuj hrivnoj aspektis kiel arĝentaj bastonetoj.

Estas interesa la valoro de tiuperiodaj hrivnoj. Kontraŭ unu hrivno oni povis aĉeti la plej bonan militĉevalon (ĝi egalas al 10 ordinaraĵoj aŭ dudek bovinoj) aŭ vilaĝeton kun 5 ĝis 7 dometoj. Ankaŭ estas konate, ke tiuperiodaj hrivnoj estis uzataj ne nur por komercaj celoj. Ilin uzis dukoj por premii siajn servantojn, kiuj ofte portadis orajn hrivnojn surkole. Eble tiuj estis la unuaj signoj de nuntempaj ordenoj kaj medaloj.

Hrivnoj iĝas rubloj

Ekzistis tiuj unuaj hrivnoj laŭ esploroj de specialistoj ĝis la mongol-tatara invado (ĉ. 1240). Pli poste el hrivno oni komencis fari rublojn, hakante ducentgraman hrivnon je du partoj (ruslingve *rublj* signifas „haki“). El tiu centgrama rublo oni faris 100 unugramajn kopekojn.

Nun ne plu ekzistas grandvaloraj moneroj. Anstataŭe oni uzas biletojn.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

Bona ŝanco por baldaŭa aliĝo al MOK

Antaŭ nelonge, intervjuate de ĵurnalisto, ĉefekonomikisto Josef Stieglitz, antaŭa vicestro de la Monda Banko, montris ke ĉi-jare por Ĉinio venos la plej bona tempo por aliĝi al la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK, angle *WTO*), ĉar la ĉina fabrika industrio kaj la amplekso de la nova ekonomio jam havas sufiĉe grandan bazon kaj ankaŭ ĉar nuntempe la ĉefaj ekonomiaj regionoj de la mondo malrapidigas sian disvolviĝon.

Sinjoro Stieglitz klarigis, ke en la mondo nun oni tre malfacile trovas tian landon kiel Ĉinion, kiu samtempe posedas fabrikantan industrion kun alta teknika nivelo, grandan produktokapablon kaj vastan konsummerkaton.

Facila integriĝo

Ĉinio havas kapablon por iĝi centro de la monda produktanta industrio. Aliĝo al MOK certe havigos al Ĉinio eblecon glate eksporti industriaĵojn



Forta laboro pretigis Ĉinion por MOK.

bonkvalitajn kaj malaltprezajn al aliaj landoj. Tiel Ĉinio povos gajni profiton kaj per tio forte helpi aliajn industriajn branĉojn por ilia pli rapida disvolviĝo.

Stieglitz konvinkigis ankaŭ, ke en la lastaj jaroj Ĉinio sukcesis progresi rilate al la moderna komputila tekniko. Sekve li opiniis, ke Ĉinio, same kiel aliaj MOK-membroj, facile kaj oportune ricevos novajn teknikojn kaj avangardajn ekipaĵojn de ekonomie fortaj landoj.

Favora situacio

Li emfazis, ke aliĝo al MOK signifos forigi limimpostajn malhelpojn. Eksterlandaj komercaĵoj povos grandkvante eniri en la ĉinan merkaton, sed se konsideri ke diverslandaj ekonomioj nun iom malprosperas, tiu premo el eksterlando povos esti malpli granda ol en la 90aj jaroj de la pasinta jarcento.

Ĉinio devas, bone utiligante la restantajn kelkajn monatojn antaŭ la aliĝo al MOK, plie alĝustigi la produktivan strukturon, akumuli ekonomian forton kaj esti plene preta por konkurenci estonte en la merkatoj ĉina kaj alilandaj.

MU Binghua

POLLANDO

Kapro pli bona ol monhelpo

Adam Jaskólski [jaskulski], la vokto de Świdnica [ŝvidnica] elpensis perfektan ideon. Anstataŭ malalta monhelpo, li donis kaprojn al homoj senigitaj je vivrimedoj.

Świdnica estas komunumo situanta apud Zielona Góra [jelona gura], en okcidenta Pollando. Ĝi konsistas el kelkaj kamparanaj vilaĝoj, kaŝitaj en profundaj arbaroj. Ne estas tie industriaj entreprenoj, kaj la iam riĉa ŝtata agrarbieno PGR kaj kvar kooperativoj de kamparanaj rondoj antaŭ longe bankrotis. Senlaboreco atingas 35 %. Ankaŭ en Zielona Góra oni ne povas trovi laboron. Multaj loĝantoj troviĝas en malbonega situacio: sen eblo ricevi laboron kaj sen rajto je monhelpo.

Iuj familioj vivas de kelkaj jaroj danke al tio, kion ili kolektas dum la somero en la arbaro. La vintrojn helpas postvivi al ili la municipa centro de socia helpo. Bedaŭrinde, ĝi ne disponas pri tiom multe da mono por povi sufiĉe bone helpadi.

Ĉiutage senpaga lakto

Iun tagon al la vokto venis loĝanto, kiu ĵus perdis renton kaj plendis, ke li ne havas monon por aĉeti panon kaj lakton

por siaj infanoj. Unufoja monhelpo estus en tia kazo nenia rimedo. Ĵus tiam la vokto ekpensis pri kaproj, kiujn oni nomas bovinoj de malriĉuloj. Ili estas malmultekostaj por vivteni, ĉar ili voras praktike ĉion – de restaĵoj el manĝotablo ĝis greso el fosoj – kaj produktas preskaŭ tri litrojn da lakto tage.

Korna terapio

Ankoraŭ en decembro de la jaro 2000 la vokto sin turnis al la komunumo kun la propono provizi monon por la aĉeto de 30 kaproj. „Oni povas doni al la homoj monon, sed ĝi rapide malaperos”, klarigis la vokto. „La bestoj donos al ili okupadon, ĉar oni devas doni al la bestoj manĝon, elpurigi bovejeton, konduki ilin eksteren ... Tio okupos pensojn kaj tempon kaj restaŭros la kutimon labori al homoj, kiuj jam forgesis, kion signifas peno.”

Oni planas dum la venontaj monatoj ankaŭ aĉeti kokidojn kaj porkidojn. La vokto volas disdonadi semojn kaj stikaĵojn, por ke la homoj denove komencu kultivi apuddomajn ĝardenojn, en kiuj ili povas planti legomojn kaj eĉ terpomojn.

Stanisław ŚMIGIELSKI

Perdita paradizo

Antaŭ kelkaj tagoj, promenante inter mia domo kaj la loka tombejo, mi rimarkis ion, kion (se mia memoro fidindas) mi laste vidis, kiam mi estis knabo.

Temis pri kvadrataj fakoj krete de segnitaj sur la trotuaro. Evidente, infano aŭ infanoj ilin kreis pro ja antikva distraĵo, nome paradizludo, kiun PIV tiel difinas: „Ludo en kiu oni devas, starante sur unu piedo, puŝi ŝtoneton tra la fakojn de surtera desegnita plano ĝis la lasta nomata paradizo.”

Mi ne scias, en kiom da landoj estas konata la paradizludo, sed ĝi havas nomon en diversaj eŭropaj lingvoj (france: *marelle* [marél]; hispane: *coxcojilla* [koksokojilja]; irlande *cleas na bacóide*; angle: *hopscotch* [hopskoĉ], ktp). Angla-nederlanda vortaro donas ekvivalenton *hinkelspeel* [hinklspil] por la angla nomo, kiu ne estas uzata en Skotlando, kie ĝi nomiĝas *peever* [piver].

Vidante la kretmarkojn sur la trotuaro, mi estis tuj nostalgie reportata al la (bedaŭrinde nun tre foraj) jaroj de mia juneco, kiun, pro konstanta migremo de miaj gepatroj, mi pasigis en diversaj eŭropaj landoj. Samtempe, tiuj kvadratoj estigis en mi ankaŭ iom da milda plezuro. Permesu, ke mi klarigu.

Terapio

Pasintjare, kaj refoje ĉi-jare, mi estis malvolonte enkarcerigita pro grava okulo-malsano en oftalmologia malsanulejo. Malgraŭ tio, ke mia ĝenerala sano estis bona, mia terapio postulis masivajn dozojn da steroidoj. Ĉiu, kiu legis aŭ aŭdis raportojn pri misuzo de tiaj drogoj fare de atletoj, scias, ke steroidoj dumtempe nenormale plialtigas fizikan kapablecon. Ili igis min hiperaktiva, instigante min konstante piediri, eĉ dumnokte. Mi ne povis resti en mia ĉambro kaj nur dum kelkaj horoj de la nokto en mia lito.

La malsanulejo estas malgranda, sen lokoj por promeni krom en koridoroj. Post kelkaj semajnoj, mi konis preskaŭ ĉiun kahelon de la hospitala planko. Iun tagon mi renkontis en la koridoro alian pacienton, maljunan virinon,

kui, kiel mi, trovis malmultan distraĵon dum teda, kvankam feliĉe provizora, duonblindeco. Mi rimarkigis al ŝi, ke la plankokaheloj memorigas min pri la paradizludo, kaj tiel ekis konversacio pri infanludoj. Ni kune bedaŭris, ke laŭŝajne la tradiciaj infanaj amuzaĵoj ne plu estas praktikataj kaj ke oni ne plu vidas (almenaŭ en nia mondoparto) gajajn infanojn ludantajn sur la strato. La kialoj estas evidentaj: danĝera kaj ĉiam kreskanta trafiko kaj la minaco de infanŝtelado kaj seksatencoj.

Kontraste, la mondo de mia infaneco ŝajnis sekura kaj senzorga. Infanoj ne timis ludi sur la strato aŭ vagi longe ekster la vido de siaj gepatroj. Knabinoj ludadis paradizludon aŭ ŝnursaltis, kaj ofte dumlude kantis aŭ recitis rimaĵojn. Laŭsezzone, knaboj ludis per rulringoj, turboj aŭ kajtoj.

Magio

Sed jam de jardekoj oni nek vidas tiajn ludojn nek aŭdas tradiciajn ludkantojn. La malaperinta aŭ malaperanta mondo de la paradizludo neniam estis paradiza, sed ĝi posedis sian simplan ĉarmon, kiu mankas en la nova malnaiva infanmondo de elektronikaj ludiloj, komputilaj ludoj, komercaĉigita popmuziko kaj poŝtelefonoj: plene forestas la magio de la pasinteco. Ni vivas en mirinda mondo, sed ĝi ne plu estas la mondo de *Alico en Mirlando*.

Nia socio ekonomie riĉiĝis – almenaŭ tie, kie mi nun loĝas – sed ĝi profunde

malriĉigis la homan spiriton, forigante la kapablecon trovi plezuron en simplaj, senkostaj amuzaĵoj. Sendube, en ĉiu epoko la maljuniĝantaj generacioj plendas pri riproĉinda „hodiaŭa” socio, sopirante je „bonaj pasintaj tempoj”, kiuj neniam estis tiom bonaj – ofte kruelaj kaj mizeraj. Tamen oni ne ĉesis songi pri la oraj tagoj de perdita infaneco. Aŭ ĉu mi estas nur stulta maljuna babilanto?

Garbhan MACAOIDH

'Ni vivas en mirinda mondo, sed ĝi ne plu estas la mondo de Alico en Mirlando'





Obeeme sekvas Abu sian patrinon Sabi: sian patron tamen li neniam vidos.

AŬSTRIO

Peza ĝojo

Naskiĝis la unua elefanto en Vieno – krome la unua en Eŭropo, kiu estiĝis per artefarita fekundigo.

Ce bestoĝardeno Schönbrunn (esperante: Bela Puto) sen homa helpo naskis post 643-taga gravedeco la 16-jara elefantino Sabi sian viran idon Abu. La elefantido neniam vidos sian patron Tembo, kiu vivas en Colchester [kolĉeste], Anglio. Por tiu procedo oni devis prepari dum monatoj la patrinon. Kvankam Sabi estas trankvilema, ŝi devis elteni fremdajn homojn, timigajn aparatojn, foje ultrasonan ekzamenon kaj ripetite kontrolojn de sango kaj fekaĵo. Nepris tiel precizigi la tagon de la folikla maturiĝo. Tiam oni prenis la spermon de Tembo, malvarmigis ĝin

al 4 gradoj, transportis ĝin al Vieno kaj uzis por fekundigo. Tiel oni procedis dum tri sinsekvaj tagoj.

Naskiĝinte, Abu pezis 110 kg: 20 kg malpli ol oni atendis. Tamen baldaŭ li pezis 181 kg kaj daŭre kreskas. Kvankam elefantido estas karulo de infanoj, necesas eduki lin. Plenkreska elefanto pezas 3000 ĝis 6000 kg. Eĉ juna elefanto, apoganta sin kontraŭ flegisto, povus mortigi sian homan amikon. Tial vartistoj fojfoje batas elefantidojn por eviti danĝeron al homoj kaj al la bestoĝardenaj instalaĵoj.

Walter KLAG

LIBERA ESPRIMADO

Ne preta por la pretero

Minacitaj estas lastatempe en sud-orienta Anglio homoj dezirantaj kune festi siajn nekutimajn kredojn kaj opiniojn. En Lewisham [luiŝam], apud Londono, la organizaĵo „Preter pretero” (angle: *Beyond the beyond*) provis kunigi en publika halo anarkiistojn, paganojn, nereligiulojn, ateistojn, humanistojn, seks-liberulojn, oponentojn de decimalismo, nihilistojn, respublikanojn, okultistojn kaj aliajn.

Tamen avertojn kaj minacojn pri forbruligo de la luita halo kaj pri aliaj damaĝoj telefone – kaj anonime – ricevis ties posedanto. La polico sciigis, ke ĝi kapablos protekti nek homojn, nek proprietaĵon, se okazos la foiro. Tial pacema festo estas nuligita – kune kun la rajto pri propra opinio. Malgraŭ tio, ke la festo ne okazis, la polico tamen kontrolis la halon sed rimarkis nenion eksterordinaran.


Will GREEN

Ne forgesu min...

- diverslandaj festotagoj
- lun-fazoj
- aliaj informoj



Donacu ĝin al viaj amikoj!
Rabato de 33% por sendaĵo de 3 ekzempleroj aŭ pli.



LA JARO

praktika Esperanto-agendo

formato 10x15cm; prezo: vidu p.2
mendu ĉe FEL, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen

butiko@fel.esperanto.be

+ 32 3 233 54 33



Laŭ civila juro ĉiuj homoj estas egalaj. Laŭ la eklezia juro tamen ofte ne.

NEDERLANDO

Samseksemo kaj islamo

Fine de aprilo imamo de roterdama moskeo estis intervjuita televide; en si mem nenio nova. La ĵurnalisto tuŝis ankaŭ la temon „samseksemo”, al kiu la imamo – ja devena el fora lando, fakte por la raporto eĉ ne gravas ĉu el Turkio, el Maroko aŭ el kie ajn – laŭ sia profunda konvinko reagis, ke laŭ li samseksemo estas „kontraŭ la naturo”, estas „malsano danĝera por la nederlanda popolo”, kaj estas kontraŭ la instruoj de la Nobla Korano.

Se tion li estus dirinta nur en loka kunveno, verŝajne oni estus reaginta: „Nu, li, ankoraŭ ne longe en nia lando, ne konas niajn liberalajn opiniojn; do li ankoraŭ reagis paseisme. Certe poste li iom pli kleriĝos.” Sed tia duon-koloniisma reago ja ne eblas, kiam io okazas televide.

Sekvis vera inundo. Protestoj, kompreneble, de la landa geja organizaĵo. Protestoj de politikistoj, kaj dekstraj kaj maldekstraj. Ĉar ne plu eblas en la nederlanda socio kondamni homojn pro ilia haŭto, raso, religio aŭ seksa orientiĝo. Jure ĉiuj homoj en Nederlando ja estas egalaj, nun ankaŭ koncerne la nupton.

Preskaŭ tuj pluraj aliurbaj imamoj publike subtenis sian kolegon en lia kondamno de samseksemo. Sed – kaj jen la problemo nun nepre solvenda – per alvoko al la justico, kiun sendepende unu de l’ aliaj faris pluraj organizaĵoj kaj instancoj samtempe, per kio oni do postulas juĝistan verdikton – espereble kondamnon, laŭ ilia opinio –, samtempe oni kolizias kun la baza jur-

principo de la lando, ke cent-procente estas disigitaj la (neŭtrala) ŝtato kaj la religiaj instancoj. Ĉar kio nun okazu? Ĉu la juĝisto (do ŝtata instanco) verdiktu super islamo (religio)? Aŭ ĉu

’Ne nur en islama rondo samseksemo ankoraŭ estas problema’

oni simple agnosku, ke kadre aŭ baze de kiu ajn religio oni rajtas senlime diskriminacii kiun ajn?

Kaj kiel statas la temo samseksemo intertempe ĉe la kristanaj eklezioj?

La romkatolika eklezio ankoraŭ relative freŝdate renovigis sian kondamnon de samseksema praktiko. Do „oni rajtas esti tia, sed fari nenion pri ĝi”, – pozicio, kiun en Nederlando preskaŭ neniu plu opinias serioza, eĉ ne interne de l’ romkatolikaj paroĥoj. En la etaj, malnovtradiciaj protestantaj

eklezioj oni ĉiam ankoraŭ vivas kun la ideo, ke „io simila en niaj rondoj ne ekzistas”. Ĉe kelkaj protestantaj eklezioj – la *remonstrantoj* (tipe nederlanda liberala protestanta eklezio) kiel unuaj – oni intertempe akceptis la faktan situacion, ke gejaj kaj lesbaj paroj ja ekzistas kaj ili do ankaŭ povas peti la dian benon dum diservo. Kaj ĝuste hodiaŭ venis novaĵo ĉi-tema pri la plej granda protestanta organizaĵo: la t.n. „Kunesurvoje-procedo” de l’ Nederland-Reformacia Eklezio, la Reformitoj kaj la Luteranoj. La Nederlanda Luterana Eklezio tre klare postulis, ke en la novaj reguloj por la (jam de jaroj farata) eklezia unuiĝo de l’ menciita triopo nepre restu plenrajta loko por gejaj kaj lesbaj nuptoj, ĉar alie la sinodo luterana komplete bojkotos la pluan unuiĝoprocedon. Do ne nur en islama rondo samseksemo ankoraŭ estas problema.

Restas ankoraŭ multe por fari, antaŭ ol oni akceptos ĉiujn homojn sen-diskriminacie egalaj.

Gerrit BERVELING

BULGARIO

Pitoreska loko

Urbo Novi Iskar troviĝas je 12 km norde de la bulgara ĉefurbo Sofio. La urbo situas sur ambaŭ bordoj de la plej longa bulgara rivero Iskar kaj konsistas el kvin kvartaloj: Slavovci, Kumarica, Kurilo, Gniljane kaj Izgrev. La nomoj de kvartaloj havas slavajn vortradikojn.

Laŭ malnova legendo la unuaj loĝantoj ĉi tie estis slavoĵoj. Iun tagon ĉi-loke haltis karavano, veturanta laŭ malnova romia vojo al Serdika (malnova nomo de Sofio), ĉar forpasis ties gvidanto, la malsana Kumariĉ. Lia parencoj decidis ne plu veturi kaj fondis ĉi-loke vilaĝon Kumarica. Iom flanke de ĝi alia familio fondis najbaran vilaĝon Slavovica (laŭ la nomo de fondinto Slave).

Dum la Bulgara Renesanco, komence de la 19a jarcento, en la apuda vilaĝo Kurilo oni konstruis la faman Kurilo-monaĥejon.



Blazono de urbo Novi Iskar.

Iskar-intermonto estas grava naturfenomeno. La altaj rokoj ĉirkaŭ la rivero konsistas el ruĝaj sabloŝtonoj, verdecaj argilaj grundoj kaj helaj kalkŝtonoj. Ili havas mirinde belajn, fabelajn formojn, kiuj eble ekzistas nenie aliloke.

Rivero Iskar fontas el Rila-montaro, fluas tra la nord-bulgara ebenaĵo kaj enfluas Danubon. Jam en la pratempoj la vasta Sofio-kampo estis fundo



GEORGI MIHALKOV

Preĝejo en vilaĝo Katina: antaŭe staras urbestro inĝeniero Georgi Georev, urbestro de Novi Iskar, kaj pastro Georgi Nikov.

de grandega lago, kiu vastiĝis inter la Balkan-, Vitoŝa- kaj Rila-montaroj.

Legendo rakontas, ke juna Istar kun sia belega edzino Larina, forlasis Rila-montaron kaj ekloĝis feliĉe ĉe la bordo de la granda lago. Foje Istar iris fiŝkaptadi. Larina, la edzino, kiu restis hejme, subite aŭdis fortan tondron. Timigite Larina galopis sur ĉevalo al la lago kaj baldaŭ ŝi ekvidis nigran ŝliman fundon. Kune kun la akvo malaperis

Iskar-intermonto kaj Novi-Iskar-kvartalo „Kurilo”.

juna Istar. Neniu plu vidis la belan Larina'n. Nur ĉiunokte, kiam la naturo silentiĝis, en la mallumo aŭdiĝis trista voko „Is-tar, Is-tar, Is-tar!”

Jarcentoj pasis, sed ĉi voko plu aŭdiĝas, tamen nun kiel „Iskar”.

Proksime al urbo Novi Iskar situas vilaĝo Katina, kie troviĝas la kalkŝtonaj piramidoj. Ili similas al kasteloj, floroj, gigantaj bestoj. En Novi Iskar estas pluraj mineralaj varmfontoj. La unua el ili, kun temperaturo 38,7°C, estas malkovrita en 1943 en kvartalo Kumarica. Alia granda varmfonto (43°C) troviĝas en kvartalo Gniljane. La mineralakvoj kuracas stomakajn, reŭmatismajn, urologiajn kaj aliajn malsanojn.

Por ŝatantoj de la fiŝkaptado perfektajn eblojn disponigas lagoj proksimaj al vilaĝoj Ĉepinci, Negovan, Katina. En ili oni povas fiŝkaptadi ploton, perkon, karpon, ezokon. En rivero Iskar estas diversspeciaj fiŝoj: rivera mugilo, barbio, ploto ka. Ĉe la rivero videblas anasoj kaj anseroj; pli maloftas ŝakaloj, leporoj kaj aliaj bestoj.

Ĉirkaŭ urbo Novi Iskar estas valoraj kulturhistoriaj monumentoj. Ĉi tie troviĝas




Ilustraĵo aldona al la legendo pri rivero Iskar.

multaj unikaj preĝejoj kaj monaĥejoj. Ili kuŝas ĉe la piedoj de Balkan-montaro. La ringo de monaĥejoj en la regiono ĉirkaŭ la bulgara ĉefurbo estas konata sub la nomo Sofia Sankta Montaro. La plej grandaj el ili estas: monaĥejoj „Sankta Dimitro” en vilaĝo Podgumer, „Sankta Ivan Rilski” en kvartalo Kurilo, kaj preĝejoj „Sankta Petka” en vilaĝo Balŝa kaj „Sankta Nikolao” en vilaĝo Lokorsko.

La regiono de urbo Novi Iskar estas pitoreska kaj alloga.

Georgi MIHALKOV



KROATIO

Cavtat – renovigita perlo apud Dubrovnik

Pri Dubrovnik, la fascina urbo ĉe la orienta adria marbordo, multaj aŭdis. Sed certe ne multaj scias, ke apud Dubrovnik troviĝas Cavtat – perlo vizitinda. Ĝi atingeblas per aviadilo, ŝipo aŭ aŭto.

La urbeto Cavtat troviĝas je 20 km sudoriente de Dubrovnik. Ĝi situas sur la duoninsulo Rat, en kies sudorienta parto kuŝas la valo Tiha. Tie la klimato estas tre favora kaj milda – aparte riĉa vegetaĵaro ĉirkaŭas belegajn strandojn.

Cavtat (latine *Civitas*) havas radikojn en la malnova historio. Ĝin fondis iliroj, kaj poste ĝi estis sub greka kaj romia regado. Avaroj kaj slavo detruis ĝin en la 7a jarcento, kaj tial parto de ties loĝantoj transloĝiĝis al Dubrovnik. Ĝis la jaro 1302 kaj ekde 1427, kun interrompoj, Cavtat apartenis al la glora komercista respubliko de Dubrovnik kaj ĝuis ties fortan kulturinflon.

En Cavtat naskiĝis la famekonata kroata juristo kaj verkisto Baltazar Bogiĝiĉ (1834-1908), la moderna kroata pentristo Vlaho Bukovac (1855-1922), la politikisto Frano Supilo (1870-1917) kaj aliaj personoj konataj en- kaj eksterlande.

La urbeto havas multajn kultur-historiajn monumentojn. El ili elstaras la princa (aŭ kapitana) palaco – renesanca konstruaĵo (starigita inter 1555 kaj 1558), sub kies tegmento estas la biblioteko de Bogiĝiĉ, arkivo, muzeo kaj kolekto de tre valoraj grafikaĵoj. Antaŭ la palaco estas skulptaĵo de Bogiĝiĉ, verko de Petar Palaviĉni.

En Cavtat troviĝas vidindaj preĝejoj, ornamitaj per pentraĵoj de divers-epokaj pentristoj kaj precipe Vlaho Bukovac, kies naskiĝdomo kaj pentraĵgalerio vidindas.

Unu el monumentaj artaĵoj estas la maŭzoleo de familio Raĉiĉ. Ĝin kreis la mondkonata kroata skulptisto Ivan Meŝtroviĉ. La maŭzoleo estas konstruita entute el ŝtono – nur la pordo kaj sonorilo estas el bronzo. Ĝi situas sur monteto, kiu nomiĝas Sankta Roko, kaj sur kiu kuŝas urba tombejo. Multaj turistoj vizitas Cavtat por ekkoni tiun unikan monumenton.

Menciindas, ke en Cavtat ĝoje revenas multaj turistoj, ĉar ilin aparte logas la specifa etoso de tiu urbeto. Post la milito en Kroatio en la 90aj jaroj, kiu postlasis multajn detruojn, oni entute renovigis la urbajn kultur-historiajn vidindaĵojn. Hotelo Croatia estas el supera kategorio. Aliaj bonaj hoteloj tie estas Cavtat, Albatros, Epidaurus, Supetar, kiuj funkcias dum la tuta jaro.

Karmen CRNKOVIĈ-VRANKO




Cavtat, same pitoreska kiel Dubrovnik, sed malpli konata.

ENERGIO

Astronomiaj nombroj pri energio en la mondo



Averaĝa homo alprenas per nutraĵoj rondcifere 12 MJ (megaĵulojn) da energio ĉiutage (M = mega = 10^6 = miliono, J = Joule = ĵulo = energio necesa por levi ĉ. 0,1 kilogramojn al unumetra alto). Sed pli granda parto de tiu energio uziĝas por teni la temperaturon kaj funkciigi la organismojn de la korpo. Nur ĉ. 3 MJ disponeblas por fizika laboro (movo de la korpo, levo de pezaj, ktp) per la muskoloj de unu homo (tio estas grimpi monton ĉ. 400 metrojn altan, aŭ 40-foje supreniri ĝis la tria etaĝo de moderna loĝdomo, havanta ankaŭ teretaĝon kiel etaĝon n-ro 0).





Se oni kalkulas je 4 miliardoj da laborkapablaj plenkreskuloj en la mondo, ties tuta energio disponebla por unutaga fizika laboro estas 12 miliardoj da MJ, tio por tuta jaro, tamen kun nur kvin labortagoj semajne, estas 3 EJ (eksaĵuloj; E = ekso = 10^{18} = eŭropa triliono = usona kvintiliono = miliono oble miliono oble miliono).

Ekspluatado de la energiohavaĵo

En la jaro 2000 sur la tuta tergloba oni ekspluatis diversajn energioportantojn, kies suma energioenhavo estis ĉ. 400 EJ, kiu estas 133-oble pli ol la muskole disponebla 3 EJ da energio de la mondloĝantaro. Kiel tiu energiokvanto dividiĝas?

1 EJ estas entenata de 24 Mt (megatunoj) da nafto. Tamen la menciita tuta produkto (ĉefe per minado) de energioportantoj konsistis el 3,4 Gt








(gigatunoj) da nafto, 4,5 Gt da karbo, 2,5 Tm³ (tera-kubmetroj) da tergaso. (G = giga = 10⁹ = eŭropa miliardo = usona biliono; T = tera = 10¹² = eŭropa biliono = usona triliono.) La elektra energio produktita nur el akvoenergio kaj atom-energio estis ekvalenta al 1,2 Gt da nafto. Renoviĝantaj („alternativaj”) energiofontoj donis ĉ. 60 EJ, el kiuj 25 EJ estis la akvoenergio, ĉ. 35 EJ la bioenergio (ĉefe el ligno). La aliaj alternativaj energiospecoj, kiel sun-, vent-, geotermika energioj ne atingis 1 EJ.

Efika utiligo de la ekspluatita energio

Estas menciinde, ke pro fizikaj (termodinamikaj) leĝoj kaj teknikaj kaŭzoj nur parto de la ĉi-supraj energiokvantoj utiliĝas.

Relvoja vaporlokomotivo, hejtata de karbo aŭ ligno utiligas la energion de tiuj nur 15- ĝis 20-procente por la



En la jaro 2000 sur la tuta ter globo oni ekspluatis diversajn energioportantojn, kies suma energioenhavo estis ĉ. 400 EJ.

movigo de la trajno, 85 % disipiĝas (perdiĝas) pro varmigo de la ĉirkaŭaĵo, akcelo de la trajno, froto inter diversaj maŝineroj kaj inter relo kaj la radoj. Moderna akvoturbino utiligas la energion de la trafluanta akvo ĝis 95%. Tio estas proksimigebla nur per tre alttemperaturaj (1500°C) gasturbinoj (en si mem 60%), se oni alkroĉas ankaŭ hejtsistemon por loĝkolonioj, agrikulturaj forcejoj kaj simile (ĝis 90%).

Inter la termoelektrcentraloj hejtataj per lignito troviĝas kies efikeco estas nur 15-procenta, sed eĉ la plej modernaj hejtataj per antracito aŭ petrolo ne atingas aŭ apenaŭ superas 50 procentojn. Plibonigas la efikecon, se post produkti elektron per vaporenturbinaj, oni utiligas la kondensitan vaporon (varmakvon) forlasantan la vaporturbinojn por la supremenciita hejtado laŭ bezono de proksimaj konsumantoj.

La efikeco de la atomcentraloj estas iom sub 50 procentoj, do iom mal-

pli ol tiu de la modernaj, sed klasiktipe termoelektrcentraloj. Fakte kaj la klasikaj kaj la atomaj elektrocentraloj estas termoelektrcentraloj, kiuj vaporigas akvon nur per diversaj fueloj (ligno, karbo, petrolo, tergaso, riĉigita uranio, ktp) al alta temperaturo. Ĉar la vaporo povas labori nur dum ĝi restas vaporo, eĉ jam „laca” ĝi devas forlasi la vaporturbinon nepre super 100°C. Nur poste ĝi povas elpaŝi en la atmosferon kaj kondensiĝi en varmegan akvon, forportantan ankoraŭ konsiderindan varmenegion. Sed en atomcentralo oni povas hejti la akvon ne tiom alten (ĉar la uranistangoj fandiĝus), ol en moderna klasiktipe varmocentralo (kie oni bezonas alttemperature fandiĝemajn, kvankam multekostajn alojajn nur kiel maŝinerojn), tial la efikeco de la unua estas iom pli malalta.

Ne estas malproksime de la vero, se oni diras, ke la energioenhavo de la fueloj du-trione perdiĝas, kaj nur unu triono el ĝi utiliĝas.

HASZPRA Ottó

Kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj?



Pri tio ekzistas du respondoj, unu pozitiva kaj unu negativa. La pozitiva estas, ke Jesuo kaj liaj unuaj adeptoj estis kaj restis Judoj. Tial la komencon de la Kristanismo ni devas kompreni el la Judismo. La negativa respondo estas, ke poste la Kristanoj sin apartigis kaj ekrigardis la Judojn kiel malamikojn. Ili opiniis eĉ ke tio estis la intenco de Jesuo. De tiam esti Kristano ŝajnis egali kontraŭ-Judismon. Pro ĉi-ambaŭ kialoj ni ne povas preparoli Jesuon aparte de la Judoj.

Paĝoj: 158; ilustrita; 21 cm; kudre bindita;
Prezo: **11,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk.. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

MALLONGE

Patrino lakto – sveltaj adoleskuloj

Obezeco (graseco, dikeco) estas grava problemo en la bonfarta mondo, tial sciencistoj konstante esploras ĝiajn kaŭzojn kaj cirkonstancojn.

Oni jam observis, ke trograseco aperanta en adoleska aĝo antaŭdiras problemojn de troa korpopezo ankaŭ por la estonta plenaĝulo; aliflanke, ekzistas sugesto, ke longa mamnutrado dum beba aĝo eble malhelpas obezecon de la adoleskulo.

Por kontroli tiujn supozojn, usonaj esploristoj faris vastan enketon, ĉu mamnutrado de beboj rezultas je malpli da adoleska obezeco ol nutrado per nepatrino (nevirino) lakto. La prestiĝa revuo *Jama* raportas, ke miloj da junaj personoj estis enketitaj. 5% el la junulinoj kaj 9% el la junuloj estis tro pezaj. Oni trovis signife pli malgrandan nombron da obezuloj inter tiuj, kiuj ricevis patrinan (virinan) lakton dum longa tempo (sep monatojn aŭ pli) kaj en taŭga kvanto, kompare kun tiuj nutritaj per arte kunmetitaj laktoj (ekzemple sukero + akvo + bovina lakto). Kompreneble, ekzistas pluraj aliaj faktoroj, kiuj



povus influi la rezulton, sed ili ĉiuj estis laŭeble dekalkulitaj.

La kuracistoj konkludis: longdaŭra kaj abunda mamnutrado de la beboj malpliigas la riskon de obezeco en adoleska aĝo. Paulo S. VIANA


Korekto

La aŭtoro de la artikolo Geno de memmortigo trovita en la junia numero de *Monato* ĝustanome estas Peng Jianjun (ne Juan). Pardonon pro mia malatento.

OH

Drinkado, genetiko kaj kormalsano

Jam estas sperto, ke moderaj, ĉiutagaj drinkantoj parte evitas korinfarkton, kompare kun nedrinkantoj. Nun oni trovis la genetikan bazon por tiu fakto. La usona *New England Journal of Medicine* en sia numero de 2001 02 22, publikigis interesan esploron demonstrantan, ke tiu fakto dependas de la genetika strukturo. Inter centoj da pacientoj, oni konstatis, ke iuj havas homozigotan genkonsiston, kiu permesas rapidan metabolismon de alkoholo, dum aliaj malrapide faras la samon. Ĉi-lastaj ricevis pli netan protekton kontraŭ korinfarkto. Oni trovis ankaŭ, ke tiuj genetike privilegiaj homoj havas pli altajn nivelojn de altdensa kolesterolo, la protekta speco de kolesterolo. Tamen, kuracistoj avertas: iel ajn, temas pri ja „modera” drinkado!



Paulo S. VIANA

FINNLANDO

Fiŝkapti ekscite

Neniu maniero aŭtune fiŝkapti estas tiel ekscita, kiel tiu allogi ilin nokte per forta lumo kaj piki per speciala forko. Alia maniero, ja vintre, estas bori truon en la glacio, eksidi apud ĝi kaj laŭkutime fiŝkapti. Pri ambaŭ originalaj specoj de fiŝkaptado mi rakontos ĉi-sube.

Per fiŝkapta forko aŭtune

Estis tempo, kiam la fiŝkaptado per forkosimila ilo estis malpermesita en Finnlando, sed nun ĝi denove eblas, kvankam por la permesilo oni devas pagi kiel por kutima fiŝkaptado. La sezono por kapti fiŝojn per forko komenciĝas en aŭgusto kaj daŭras ĝis novembro. Poste venas neĝo kaj la lagoj glaciĝas. Prin-tempe kaj somere (majo-julio) la noktoj estas tro lumaj. Tial la plej taŭga monato por la fiŝkaptado per forko estas septembro.

Atendu senventan kaj malluman nokton. Lunlumo igas la fiŝojn timemaj. Ankaŭ la flavaj folioj, falintaj de arboj sur la akvon timigas ilin. Ĝuste tial oktobro estas malpli oportuna ol septembro. Remu aŭ pagaju vian boaton silente al malprofunda loko proksime al la bordo. Nur ĉe ege klara akvo eblas travidi pli ol unu metron enen. Ne interparolu, sed gvatu la ombrecajn fiŝojn!

Kompreneble, vi bezonas ankaŭ lumegon – petrolan lumigilon aŭ elektran lampon kun akumulilo. (Antaŭe oni uzis brulantajn torĉojn.) La fiŝkapta forko kutime havas du-tri pintojn kaj longan tenilon. La vetero aŭtune ofte estas malvarmeta, tial vestu vin varme kaj ne forgesu la savoveŝton. La fiŝojn, kiujn vi kaptos, metu en ujon, por ke la fundo de via boato ne ŝlimiĝu. Se tio okazus, vi povus glitfali en la akvon kaj droni.

Kiam la fiŝoj ekvidas la lumon en la nokto, ili blindiĝas. Ezokoj ofte haltas apud la boato kaj ne plu moviĝas. Tial ili estas la plej facila kaptajo, sed kelkfoje okazas, ke la ezoko pafe malaperas kaj neniu

fiŝkaptisto povas sufiĉe rapide reagi. La plej grandaj ezokoj, kapteblaj per forksimilaj iloj, pezas dekon da kilogramoj, sed pli ofte eblas kapti 2-4-kilogramajn. La kapteblaj fiŝoj povas esti perkoj, plotoj, tre malofte koregonoj. Dum unu nokto oni kutime kaptas dekon da fiŝoj. Tamen kutime post la noktomezo kaj la fiŝoj, kaj la fiŝkaptistoj malaperas. Eble ili laciĝas.

En glacitruo vintre

Post kiam dika glacio kovras lagojn, riverojn kaj maron, la finnaj fiŝkaptistoj tamen scias kiel elturniĝi. Ili havas fortikan borilon, per kiu ili boras truon eĉ en pli ol unumetran glacieron. La akvo unue elŝprucas kiel fontano, sed poste ili povas trankvile sidi apud la truo kaj esperi, ke iu malsata fiŝo englutu la muŝlarvon kaj hokon. Pacienco estas bezonata, ĉar ofte oni kaptas nenion aŭ nur malgrandajn perkojn kaj leŭciskojn. Tiuokaze necesas translokiĝi kaj plu bori unu truon post la alia. Tiu

'La plej taŭga monato por la fiŝkaptado per forko estas septembro'

ekzercado postulas fizikajn fortojn de la korpo, moliĝinta en oficeja laboro.

Vergon oni ne bezonas, sed nur hokon, fiŝŝnuron kaj la larvojn, aĉeteblajn en vendejo aŭ perpoŝte. Estas bone, se la dorsosako kun varma trinkaĵo kaj sandviĉoj uzeblas ankaŭ kiel eta seĝo. La plej ŝatata sezono por traglacia fiŝkaptado estas februaro-aprilo, kiam la reaperinta suno lumigas la brilajn vastaĵojn, kiam bluas ĉielo, kaj la glacio estas sufiĉe dika kaj sekura eĉ por aŭtoj. Precipe viroj ŝatas pasigi sian libertempon surglacie, de mateno ĝis vespero. Tie ili liberiĝas de hejmaj babilajoj, laborejaj problemoj kaj stresoj. Sidi tute sola en la vastaĵo, aŭskulti la malmultajn bruetojn kaj sonojn de la naturo, ĝui lumon kaj puran aeron – ĉio ĉi estas la plezuro. Tial vere ne gravas la nombro de kaptitaj fiŝoj.

Kelkfoje ankaŭ geedzoj aŭ familioj kun infanoj ĝuas la saman hobion. Povas esti, ke la leŭciskojn kaj perkojn hejme manĝos la kato, ili ja enhavas ege da ostetoj. Tamen kuireblas ankaŭ manĝaĵoj, en kiuj la ostetoj tute ne ĝenas. Oni bakas la fiŝetojn dum 4-6 horoj en fomo, kun iom da grasa viando. Tiun pladon finnoj ŝerce nomas „kalakukko” (fiŝkoko). Ĝi havas dikan ŝelon el sekala knedaĵo. Kuireblas ankaŭ „patakukko” (potkoko) sen knedaĵo. Ambaŭ pladoj estas tipaj por la orienta parto de la lando, kie troviĝas pli da lagoj ol en okcidenta Finnlando.

Plurloke en Finnlando kelkfoje okazas konkursoj pri traglacia fiŝkaptado. En ili la konkursanto strebas kapti kiel eble plej multe da fiŝoj dum difinita tempo-daŭro, ekzemple dum 3 aŭ 4 horoj. La premiojn gajnas tiuj, kies fiŝoj pezas plej multe. Kelkfoje la konkurso estas pagenda, kaj la pago poste estas uzata por plibonigi la vivkondiĉojn en la lago, por reprodukti fiŝidojn aŭ por iu asocio aŭ partio. Ĉiuokaze la

gajnintoj iĝas konataj kaj ties fotoj aperas en gazetoj. Krome ĉiuj partoprenantoj povas ĝui belan tagon en la glacia vastaĵo kaj longe rakonti pri tio poste.

Printempe povas okazi akcidentoj, precipe sur maro aŭ sur rivero. La fiŝkaptistoj ne rimarkas, ke ilia parto de la glacio fariĝas floso, kiu portas ilin al danĝero kaj ne plu eblas surbordiĝi. Tiuokaze oni bezonas rapidan helpon de helikoptero aŭ de boato. Plie, ĉiam troveblas lokoj, kie la glacio estas nefortika, maldika kaj rompiĝema. Tamen tio ja igas la fiŝkaptan hobion pli ekscita!

Saliko



KINO

Dek tri tagoj¹

Multaj kritikistoj atribuas la sukceson de *Dek tri tagoj* al tio ke oni metis la vidpunkton ĉe la okuloj de speciala konsilanto de prezidento Kennedy, Kenneth O'Donnell [kenet odónl], ludata de Kevin Costner [kevn kozner], unu el la produktistoj.

de stabo de Kennedy, generalo Maxwell Taylor [meksüel tejler]. Li verkis, dum la prezidenteco de Eisenhower [ájznhaüer], furoran libron *Necerta trumpeto*², en kiu li refutis kion li nomas teorio de amasa reprezalio. Taylor asertis ke oni devas koncentri sian klopodon al la venko en lokaj militoj per konvenciaj armiloj kaj per ekonomiaj kaj politikaj rimedoj. Taylor en tiu ĉi filmo tamen estas neniel diferenca de Lemay, al si ĵurante venĝi la honton de la malsukcesinta surteriĝo en la Golfo de Porkoj. Kennedy firme de-

cidis post la evento, ke li neniam duan fojon akceptos rekomendon de la kombinitaj ĉefoj de stabo sen unue defii ĝin.

Malbona aŭguro


Post konferenco en la Ovoforma Buroo de la Blanka Domo, generaloj diras al si en la koridoro, ke oni devas fari ion por forigi la Kennedy'ojn. La spektantoj subite sentas, ke tio povis konduki al la tragedio en Dallas [dalas]. Multaj pensas, ke tio estas parto de granda skemo inkluzivanta la mortigon

Kennedy havis elekto-eblon inter nuda perarmila solvo, kiu riskas tuj startigi tutmondan nuklean konfrontadon, kaj tiu pere de negoco, kaj Kennedy penis laŭiri la duan vojon. Pruvas la sanecon de la usona demokratio, ke tia filmo estis bone akceptata de la publiko. En la fono estis ankaŭ nostalgio al la „Camelot” [kemlot], atestata, ekz., de la magazino *Time* [tajm], kiu revokis, kontraste al la banala inaŭguro de prezidento George W. Bush [ĝorĝ buŝ], sian propran raporton pri la ekscito kiam „la plej bonaj kaj la plej brilaj” enmoviĝis, la 6an de januaro 1961.

En la filmo la fratoj Kennedy kaj ilia irlanddevena konsilanto rezistis preskaŭ solaj la militistaron. Oni ne surpriziĝas pri la paroloj de Curtis Lemay [kertis lemáj]. Estas iel alie pri la ĉefo



Ĉefrolantoj (de maldekstre): Kenneth O'Donnell (Kevin Costner), Robert Kennedy (Steven Culp), John F. Kennedy (Bruce Greenwood).



Ekzekutiva Komitato de la Konsilio de Nacia Sekureco (reala foto).

1. J.F. Kennedy, 2. Dean Rusk, sekretario de ŝtato, 3. Robert McNamara, ministro pri defendo, 5. Maxwell Taylor, prezidanto de la kombinitaj ĉefoj de stabo, 8. Robert Kennedy, prokuroro ĝenerala (ministro pri justico), 9. Theodore Sorensen, speciala konsilanto de la prezidanto, 11. McGeorge Bundy, speciala konsilanto de la prezidanto, 12. Douglas Dillon, ministro pri financoj, 13. Lyndon Johnson, vicprezidanto.

de Martin Luther [lufer] King, sed oni flaras eblon de rekta komploto fare de la militistaro.

Militistoj sin trovas ankaŭ en Sovetio. La filmo enkondukas epizodon pri rekta kanalo inter Ĥruŝĉov kaj Kennedy. Prosperis al Ĥruŝĉov fine subpremi la militistaron, kaj la transportoŝipo dramece ĉirkaŭturnas sin antaŭ la kuba marbordo. Iu filmrecenzisto komentariis, ke tiu persvadinto estis Anastas Mikojan. Tio tre povas esti.

Mi mem vivis tiujn tagojn surloke en Novjorko. Dum tiuj tagoj, la sorto de la planedo estis en la manoj de deko da personoj, kio estis situacio ne imagita de la raciistoj de la 19a jarcento sed io absurda.

Postaj eventoj

En sceno proksima al la fino personoj de la dramo diras unu al alia: „Ni venkis kun la subteno de aliancanoj en

la Pan-Amerika Unio kaj en UN”. Ni sekvu tiun direkton, kaj faru amikojn en suda Azio. Ili ne sciis, ke ili kaptiĝos en senfina marĉo de Vjetnamio. Unu generacion poste la prezidanto de Usono estis la ekskontraŭmilita movadano Clinton [klingtn]. YAMASAKI Seikō

1. Usona originala titolo: *Thirteen days* produktita en 2000 de Armyan Bernstein, Peter O. Almond kaj Kevin Costner.
2. Originala titolo: *Uncertain trumpet*.

POLLANDO

Krakovaj signaloj

Ĉi-jare en Krakovo estis fondita nova Esperanto-Teatro „Areno”, kiun iniciatis kaj gvidas s-ino Jadwiga Gibczyńska - populara krakova aktorino, honora membro de UEA, ankaŭ konata kiel lanĉinto de la Esperanta Unuaktora Teatro (1964 j.). Ĉi tiun novan iniciaton kunhelpis s-ino Lidia Ligeza - krakova poetino kaj tradukistino. „Areno” trovis sian sidejon en la Krakova Urbocentra Kulturdomo.

„Areno”, la nomo de la nova teatro, signifas laŭsence la diversecon de kulturaj prezentadoj. Pere de esperantlingvaj teatraj monodramoj, literaturaj, muzikaj, plastikaj prezentadoj, oni diskonigas Esperanton inter krakovanoj.

La 5an de februaro 2001 okazis la inaŭguro de „Areno”. La inaŭguron markis la monodramo „Signaloj”. Ĝi estas eta



Jadwiga Gibczyńska.

fragmento el la fama dramo de Karol Wojtyła „Antaŭ la vendejo de juvelisto”. Temas pri la vendejo kun abundaj diversaj juvelaĵoj, inter kiuj ankaŭ haveblas oraj edziĝ-ringoj. La dramo rakontas pri la emocioj kaj suferoj de virino, kiu junaĝe perdis sian edzon, pereintan dum milito. Estis montrita forta kaj persista animo, kiu venkas ĉiujn barojn.

La rolon de Teresa majstre plenumis s-ino Gibczyńska, kiu ludis sugeste kaj realece. Ĉiuj povis senti sin ĉi-momente atestantoj de ĉi tiuj eventoj. Lerte aranĝita simpla scenografio prezentis surscene la modestan ĉambron de Teresa. Ĉi-momente klare videblis malnovaj domoj de la urbocentro. De la malnova turo aŭdiĝis

sonoro de la 18-jarcenta horloĝo, kaj tuj poste aŭdiĝis la tipe krakova belsona trumpetsignalo de la apuda Preĝejo de Sankta Maria - vere mirinda koincido.

Ĉi tiu plene sukcesa inaŭgura spektaklo malfermis la sezonon de la kultura kaj poresperanta agado de la Teatro „Areno”. Marian KOSTECKI

de István Ertl

Jarmilŝanĝo

En oblikva kuŝpozicio, kun vidkampo precize limigita al la kelk-cola ekrano, li vidis pretersalti la flagrajn informerojn. Palpebrumo haltigis aŭ malhaltigis la tekstofluon, opaj okulfermoj regis la debiton. Kun rutina volego, li penis ignori la senton de juko en la stumpo.

Tiktako vekis lin je la sesa dudek. Li piedpintis al la pezaj pordoj, transe ŝaltis la komputilon laŭkutime. Konvenos tiel komenci, per fekundo dozita: dum dormas la infanoj, dum ronkas ankoraŭ la bogepatroj. Du alineojn li tradukis diligente, sed ĝisvenis sensencon kiun neniu interpreto superus. Pli bone, do, nun forredakti sin el ilia vivo - li intuis -, morgaŭ maleblos, nerefareble. Tamen de la garaĝo li retrohastis, estus ja stulte lasi perdiĝi la tradukon. Manke de disketo, li komandis paperan version, dampante la printil-bruon per kuseno.

En la lastaj jaroj sufiĉis malfermi la butikon je la sepa. De kiam la freŝaj bakaĵoj alvenis kamione el panfabriko, forestis la fruega aferumo ĉirkaŭ la praa forno. Eĉ tiel, ŝi vekigadis je la horo kutima dum jardekoj, por poste sinki en duone bonfaran soporon, dum la granda, kotbul-glua hundo en la korto ekfrotis la hundujajn latojn per sia grinca ĉeno.

Kun klare percepteblaj intervaloj, la hejtosistemo ree kaj ree proksimiĝis al sia povum-limo.

„Vi ne povas ŝati tion, vi estas infano.” „Panjo ĵus foriris.” „Tion ni povus rigardi iomete.” „Ni ne plu ŝatas la glaciaĵon.” „Kunportu nin ĉi tien plian fojon.” Ĉi-loke li malŝaltis la registraĵon, kaj lasis sin fali en torporon tiom longe atenditan. Kiam li alarme revekiĝis, unu feria foto sur la komodo estis falinta kontraŭ alian enkadraĵon. Sur ĉi lasta ili videblis ĉiuj kvar, ridante al estonteco tiam senduba.

La Volvo malfacile startis, sed la garaĝ-pordo glitis malfermen senprobleme. La eksterorda deĵoro devis komenciĝi post dudek minutoj. Praktike neniu aŭto pasis ĉi-hore sur la malĉefaj stratoj, kaj des malpli ju pli li proksimis al sia posteno. Li elpoŝigis cigaredon.

Ankoraŭ retoj specialaj protektis la viton de predemaj birdoj, ĝis la alveno de la rikolta trupo gaja, konscia pri la valoro de ĉiu tarda vinbero trovota. La kaŭĉukaj botoj solide ankris ilin al la ĉiesa grundo.

Trian fojon ŝi venis al la trinkejo por resti tutan tagon, malpli por konsumi ol por konsumiĝi ĉe la aŭtomato ĉiam mongluta, foje monŝuta. Ŝia eleganto perfektis por la koktela mondumo de ŝia edzo, sed ne estis mislokita ĉi-lokale. Tage ok mil frankojn kostis ŝia helpokrio, kiun neniu aŭdis krom la barestro, kaj eĉ tiun ĉi ĝi alvenis nur kiel ĉarma tintado de monera svarmo.

La vilaĝestro forŝovis siajn pend-dosierojn kaj malfermis plurajn el atendantaj kovertoj. La planoj kun la kvin eblaj traceoj de la aŭtovojo kuŝis sur aparta tablo, kiel kvin minacleteroj. La konsilianoj alvenos je la deka, kaj neniu forkonvinkos ilin de progres-paŝo margene suicida.

La pluŝkuniklo falis tra la kradoj el la liteto. Li ploris insiste por ĝin rehavi, sed la dikaj kverkaj pordoj dampis la sonoron pri kiu la gepatraj timpanoj lacis ĉiukaze. Bonŝance, restis la suĉilo por konsolo relativa.

La eksplodo estintus - kiel decas - subita, unufrapa kaj detruiga. La fabriko dissaltus al pecetoj same kiel la trinkejo, kaj la puŝ-ondoj zorgus ke neniu muro restu stara en la vilaĝo. La vespera novaĵ-programo tiklus la nacian nervaron per la unua katastrofo de la nova jarmilo, kaj pli ol unu spektanto rezignus sian bovaĵon por minuto.

La montrilo. La horero. Tempo.

Kaj nenio, nenio, nenio estis sama - nek alia - dum la posta tago. ■



Pri kelkaj radikoj de la kristana kontraŭjudismo

Kristanismo devenis el judismo; tion certe neos neniu; sed ilia rilatado dum la jarcentoj oftege estis tre problema. Ĉu do denaske kaj – sekve – neeviteble ili estas rivalaj (aŭ eble eĉ malamikaj), aŭ ĉu „nur” temas pri historie determinita ĉeno da miskomprenoj kun ofte teruraj sekvoj?

Du personoj ĉiam denove rolas tre centre en tiu ĉi temo: Jesuo kaj Paŭlo. Pri iliaj diroj kaj intencoj ekzistas plej malsamaj interpretoj. Por kelkaj homoj Jesuo estas kvazaŭ-identita je Dio mem, por aliaj li estas „simple” profeto, por ree aliaj li estas „nur” judo (eble rabeno, eble eĉ ne), kiu iniciatis malĝustan vojon disde la aŭtenta judismo; ankaŭ pri Paŭlo la juĝoj ege diverĝas.

Profesoro Tomson laboras pri *Nova Testamento (N.T.)* kaj patristiko (scienco pri frukristanaj tekstoj, filozofio kaj teologio) ĉe la universitato de Bruselo; samtempe li estas i.a. prezidanto de la belga „Institutum Iudaicum” kaj eksterlanda membro de la Rennert-Centro por Jerusalemaj Studoj en Israelo. Ne mirinde, ke jam de jaroj internacie li estas fama kiel unu el la plej gravaj sciencistoj koncerne la judan flankon de l' ekesto de kristanismo.

Estas ĝojige, ke – eĉ preskaŭ samtempe kun interalie la nederlanda versio – ankaŭ en Esperanto aperis lia ĵusa studaĵo *La afero Jesuo kaj la Judoj*.

En la Internacia Lingvo ĝis nun bedaŭrinde aperis ja preskaŭ neniu teologia verko; kaj jam nur tial tianivela libreto nepre meritas nian atenton!

La ĉefa tezo

La ĉefa tezo de Tomson estas, ke – post la neniigo de l' Jerusalema templo en 70 p.K. – por la membroj de la movado ĉirkaŭ Jesuo-kiel-Mesio fariĝis multe pli riske ol antaŭe, esti konsiderataj kiel judoj. La ĵusa Juda Milito en (Romia) Palestino ja ĉie en la imperio suspektigis la judojn por la regantaj ta-



voloj. Tio kaŭzis minimume certan re-redaktadon de la tekstoj, kiuj poste fariĝis nia Nova Testamento. Kaj tio okazis kvazaŭ-aŭtomate en kontraŭ-juda senco, por eksterdanĝerigi kristanisman, por substreki kaj pliemfazi la diferencojn disde judismo.

Tiun tezon jam delonge akceptas multaj fakuloj-teologoj en ĝia baza formo. Multe pli probleme estas, laŭ-detale indiki, kio

en *N.T.* povas esti ankoraŭ la originala/aŭtenta formo de l' koncerna *N.T.*-a teksto (do, sen tia re-redaktado) kaj kio estas tekstero, kiun siatempe oni tiusence „adaptis”. Sed tiajn por ĝenerala publiko verŝajne tro komplikajn detalojn Tomson en la nuna libro traktas nur tre ŝpareme.

La afero Jesuo kaj la Judoj ja estis verkita por iom klera, sed ne fakulateologa publiko. En ĝi ne necesas konsenti pri ĉiuj detaloj: sed la ĝenerala mesaĝo de la libreto estas tiel grava, kaj tiel prava, ke mi esperas, ke legos – kaj serioze pristudos – ĝin multaj homoj, religiaj kaj ne-religiaj. El ĝi postrestu minimume la konscio, ke fundamente kristanismo kaj judismo predikas la saman unusolan Dion, kaj ke kristanismo absolute ne devas esti kontraŭ-juda (aŭ pli ĝuste: ke por esti vere kristana, kristanismo malaperigu la kontraŭjudisman).

Miskomprenoj aŭ antaŭjuĝoj

Tro ofte oni (la ĝenerala publiko, la simplaj kristanoj, sed foje ankaŭ la ordinaraj pastroj kaj pastoroj) asertas pri la rilato inter Jesuo kaj judismo aferojn, kiuj historie kaj/aŭ teologie ne estas ĝustaj, sed kies sekvoj fariĝis teruraj – ĝis eĉ la krimaj ekscesoj de la nazia amasmurdado (ŝoa)¹ de judoj dum la dua mondmilito. Klara ekzemplo de tia misaĝo estas la aserto: „la judoj murdis la Kriston”, aŭ eĉ pli absurde: „la judoj mortigis Dion”.

La laste menciita kulpigo estas rekta neblaĵo, bazita sur malĝusta teologio: Dio, estante transcenda, ne povas esti

murdita; kaj Jesuo ne estas Dio. Por ortodoksa kristanismo, kaj orienta kaj okcidenta, Jesuo ja estas „Dua Persono de la Dia Triunuo”, sed pro tio nomi lin Dio estas teologie ... herezo. Por liberaj kristanoj la temo, ĉu identigi Jesuon kun Dio aŭ ne, ne ekzistas serioze.

Sed ankaŭ la unua diro ne defendeblas: unue, Jesuon oni krucumis kaj krucumo estis puno de la Romia Imperio, ne juda puno. Do mortigis lin la romiaj aŭtoritatoj. Kompreneble, tion ili faris ne el propra iniciato; kunkulpas pluraj judaj funkciuloj, ĉefpastroj, sadukeoj ... sed tio ne estas „la” judoj. Des malpli „la” judoj de ĉiuj pli postaj generacioj.

Atenta relegado de la *N.T.*-aj tekstoj, gvidate de Tomson, klare montras, kiel origine oni ne jam kunkulpigis pri tio la fariseojn, sed ke en pliposta kontraŭjudiganta fazo ankaŭ tiujn oni provis fari kulpajn pri tiu juĝista murdo. Tiel Tomson senmaskigas plurajn „adaptojn” en la tekstoj de *N.T.* Miasupoze por multaj, eĉ por multaj kristanoj, kiuj regule legas la biblion, liaj klarigoj povas foje efiki kvazaŭ novaj okulvitroj, per kiuj oni ekvidas pli senantaŭjuĝe, pli klare, pli realece.

Preferoj

Por Tomson la evangelio laŭ Luko estas la malplej kontraŭ-jude influita evangelio. Ankaŭ la aŭtentaj leteroj de Paŭlo (do nepre ne la tiel nomataj dua-paŭlaj leteroj al Timoteo kaj Tito) estas por li ege gravaj fontoj de informoj. Tion li klarigas plurloke per ekzemploj.

Tamen, kvankam mem nur „simpla” teologo, mi havas kelkajn detaletojn por komenti: se doni ekzemplon, ĝuste en la evangelio laŭ Luko ni legas ke ĉe la t.n. lasta manĝo Jesuo diras: „Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo (mia kursivigo!) en mia sango”, kion oni ofte interpretis kiel pruvon, ke la malnova interligo de Dio kun la juda popolo do ŝajne depost tiu momento estas anstataŭigita de ia nova interligo de Dio kun „la eklezio”. Opinio sufiĉe kontraŭ-juda, ĉu ne?

Ĉe ambaŭ Marko kaj Mateo tiuscene oni legas: „ĉi tio estas mia sango de la (do ŝajne jam ekzistanta) interligo”. (Ĉe Johano la tuta sceno ne estas menciata.) Ke en pluraj manuskriptoj mankas ĝuste ĉi tiu tekstero el Luko, ne malhelpis, ke – nome de Luko – ĝi grave efikis tra la historio de l' kristana kontraŭjudismo; kvankam Tomson prave povus diri, ke „Jen, ne Luko do tion asertis!” Bedaŭrinde, tiun ĉi detalon li pretervidas. ▶

► Pri kelkaj detaloj foje mi ne povas konsenti: ekzemple, p. 33, Tomson datumas la *evangelion koptan laŭ Tomaso* en la fino de la 2a jarcento kaj nomas ĝin gnostika. Pri tio sentroige oni povas konstati, ke la tiuterenaj fakuloj atingis minimume la konsenton, ke ĝi minimume ne estas gnostika. Pri la datoj oni dubas inter unua duono de l' 1a jarcento ĝis la dua duono de la 2a.

Pri la traduko

Al amiko Rob Moerbeek mi gratulas, ke malgraŭ siaj multaj taskoj en

sufiĉe mallonga tempo li sukcesis fini tiun ĉi laboron, pri kiu pro tempomanko mi devis rezigni. Tamen restas kelkaj malgrandaj „makuletoj”. Mi dubas ekzemple pri lia *pravigo el la kredo* (p. 132); persone mi dirus *justigo el la fido*. Kredo ja havas tro da gnoseologiaj kunsencoj; ĉe Paŭlo temas pri la *fido* je Dio (pensu pri la lutera „sola fide”). La Di-ordonoj de l' Torao oftege estas vortigitaj en la formo *ne* de imperativo sed de loganta estonto: do (p. 54) *vi ne mortigu* nepre estu *vi ne mortigos* ktp. Je p. 101, linio -10, *preĝejo* estas eraro por *eklezio*. Kaj, ho Rob, la vor-

ton *afelio* (p. 146) mi ne uzus en tia ĉi libro. Gerrit BERVELING

1. Mi emfaze rifuzas por tio uzi la nun fojfoje uzatan terminon *holokaŭsto*, ĉar tio signifas bruloferon al iu dio, kio ĉi tie nepre ne okazis.

Peter J. Tomson: *La afero Jesuo kaj la Judoj*. Eld. FEL, Antverpeno, 2001. 158 paĝoj kudre binditaj. ISBN 90 71205 94 0. Prezo ĉe FEL: 11 eŭroj + afranko.

Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko
<http://retbutiko.esperanto.be>

1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel
La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR

2 Anna Löwenstein
dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

3 K.J.K. Vroegop
Johano Prezo: 7,50 EUR

4 Ulrich Matthias
Esperanto: la nova latino de la eklezio Prezo: 7,95 EUR

5 August Vermeylen
La migranta judo Prezo: 8,00 EUR


6 Lena Karpunina
La bato Prezo: 12,00 EUR

7 Peter J. Tomson
La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

8 Leopold Vermeiren
Brulanta kastelo Prezo: 3,00 EUR

9 Pasporto al la tuta mondo
(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR

10 Emile Van Damme kaj
Christiane De Vleminck
Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR



Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Fakse: + 32 3 233 54 33

Eksterordinara murdisto

Nia ĉiam klera kaj klara verkemulo André Cherpillod regalis nin ĉi-foje per biografieto pri Giles de Rais (1404-1440), unu el la plej eksterordinaraj murdistoj de la mezepoka mondo. Pri li aperis multaj legendaj verkoj, sed li mem estis vere vivinta persono. Kvankam la legendo pri „Blubarbulo” ekzistis longe antaŭ la naskiĝo de Giles de Rais, oni ne malprave trovis en li elstaran ekzemplon de la Blubarbula karaktero.

Ĝuste kiom da infanoj – plejparte knabojn, sed ankaŭ knabinojn – Giles de Rais seksperfortis kaj poste murdis, estas nesciate. Taksoj varias inter 140 kaj multaj centoj. Oficiale oni akuzis lin pri 140 tiaj murdoj. Kiel li sukcesis dum sia mallonga vivo tiom murdadi? Nu, li estis proherede riĉa, efektive, riĉeĝa, kaj per tiom da mono oni povas kaŝe faradi multon. Li povis mem, aŭ utiligante servistojn, „dungi” aŭ private adopti aŭ promesi eduki aŭ altpostenigi infanojn el multaj regionoj, kaj ja dum lia tempo ne ekzistis presaĵoj aŭ aliaj ĝeneralaj informservoj, kiuj povus raporti pri lia agado. Per mono li povis aĉeti la volontan silentadon de la servistoj, kiuj elserĉis kaj venigis al li la infanojn, kaj kiuj post ĉiu murdo kaŝis, enterigis, bruligis, aŭ iumaniere malaperigis la kadavron.

Kiel ĉiam, Cherpillod verkas per neriproĉebla lingvaĵo, kiu tre plezurige legiĝas. Al tiu, kiu volas legi pri la ne tre edifa historio de Giles de Rais, mi rekomendas la verkon.

Donald BROADRIBB

André Cherpillod: *Giles de Rais, granda senjoro, sodomiisto kaj murdisto*. Memeldono, Courgenard (Francio), 2000. 44 paĝoj, vinkitaj. ISBN 2-906134-51-1.

Oazoj kaj kompasoj


Jen du poemlibretoj, fakte kajeroj modeste eldonitaj, kiel kutime ĉe Bero. *Kanto de telegrafistoj*, de Velebit, aperas post la 85a jariĝo de ĉi kroata aŭtoro. En multaj el siaj poemoj li sekvas parnasecan metrikon, tamen ne plene regule, ĉu pro neatento, ĉu pro neobservo. Alifoje li poemas proze, kaj fakte mi sentas liajn prozajn erojn pli poeziaj ol la versaj, kie la rimoj kaj ritmoj ofte iom ĝenas. Des pli kiam oni trafas platan aŭ banalan enhavon, kiel en *Madrigalo* aŭ *Nesendita letero*. Pluraj pecoj estas, nu, jes, en ordo – sed nenio nova sub la suno. Plej eksmodaj kaj ekstersezonaĵoj mi trovas liajn verdstelismajn versojn, kiel en *Omaĝe al junular-kongresoj*, kun jena fino:

*Benita estu Majstro-saĝo,
Homama sent' de lia koro!*

Bonas ja aliaj, kiel la klasikeca *Hipoĥondrio*, sed, verdire, neniu el la pecoj de ĉi kolekto impresas kiel rondo de perfekta gemo aŭ juvelo. Velebit prezentas tonon alteme splenan (antaŭ morto palpeble proksima) kaj ironian, kiel montras ĉi versoj el *La lasta deziro*:

*Ĉar stulta, mi neniam guron
da vino provis, – kapo dura,
kvazaŭ vinspecoj ĉiuj plenus
de l' venen' vipura.*

Ankaŭ ĉe Mallia legeblas poemoj esperantismaj kun „aliro tro patosa kaj maltro originala kaj mema”, laŭ la vortoj de Neves en la enkonduko. Preskaŭ la tuta lasta duono de la kolekto



konsistas el akrostikoj, kiuj, same, apenaŭ entenas atomon da poezio, krom eble en *Johano*, akceptebla, se konsideri la cirkonstancojn.

Tamen *Marionetoj* proponas plurajn poemojn tre atentindajn, kiel la titoldona *Marionetoj* mem, *Nova Pentekosto* (eble iomete tro rimdependa)

Erotika danco sen lingva certeco

Jen la kvara libro el la esperantigita serio de Leopold Vermeiren. Poeto Marko, por ke lia amatino Silvia permesu kun ŝi amori, devas ĉiufoje improvize rakonti al ŝi iun am-amoran historion laŭ proponitaj de ŝi tri vortoj: maniero, memoriganta pri „Mil kaj unu noktoj”, renversita role laŭ la moderna feminisma modo. Kaj li rakontas. En la libron eniris la naŭa, deka kaj dek-unua lia amorprepara improvizaĵo („La egipta dancistino”, „Stranga virino” kaj „La labirinto”). La unua rakonto estas la plej granda, la plej erotika kaj aventurplena - tial ĝi okupas la centran lokon en la libreto kaj donis al ĝi la ĝeneralan titolon.

La antikva Egiptio en la rakonto estas absolute abstrakta kaj fantasta. Estas eĉ ne anakronismoj, sed ridindaĵoj: oni uzas tie silkajn (!) gantojn (!), sapon, lampojn, kiuj donas blankan lumon, ks. Pri belaj moroj de la egiptoj ni eĉ ne parolu. Nu, tio ne gravas, ĉar por la improvizanta poeto la detaloj ne gravas. Pluraj scenoj de seksumado iom ĝenas nur pro troa simileco, kaj iom mirigas pri neelĉerpebla vira potenco de la heroo. Ne gravas, ĉar, malgraŭ ĉiuj minacoj, la geamantoj finfine kunigigas, ĉiuj feliĉas, kaj Silvia permesas al Marko kun ŝi kuŝi. La dua rakonto estas, eble, la plej respondanta al postuloj de bona realisma literaturo, sed ne tro pretendema. Tamen senreviĝo de homo, enamiĝinta al telefonknabino, pri kies profesio li komence ne suspektis, estas sufiĉe viveca. La lasta rakonto, kiel homo trovas nekonatan amatinon malgraŭ ĉiuj obstakloj, estas tro primitiva kaj prezentas miksaĵon de diversaj ĝenroj, kio en mallonga rakonto neniel taŭgas. Foje estas impresoj, ke iuj mankoj devenas de tro hasta verkado kaj de tio, ke la tekston neniu kontrolis aŭ provlegis: ekzemple, sur



la p. 72 la heroino nomas la heroon per la nomo, kiun ŝi ekscias nur fine de la p. 73, aŭ sur la p. 67 la virino, venante por malfermi la pordon, SIDIS en mantelo...

Malgraŭ ĉio dirita, oni povus rekomendi la libron kiel leĝeran legaĵon en metroo, aŭ antaŭ dormo, aŭ - ĉefe - dum atendado de amat(in)o, se ĝi ne havus treege grandan mankon: lingvan nekorektecon. Kelkajn erar(et)ojn oni povas, eble, atribui al ne sufiĉe korektita kompostado, sed

plejparto sendube devenas de la tradukinto, Lode Van de Velde. Estas kaj necerteco pri uzo de akuzativo (jen ĝi evidente mankas, jen superfluas), kaj misuzado de refleksivo, kaj misuzado de estonteca kaj estinteca tempoj anstataŭ imperativo aŭ kondicionalo (ekzemple: „li sentis, ke estUs pli bone, se li ne dirls tion” - p. 79), forlaso de „ĉu” en demandoj ... La tradukinto fojfoje strange uzas prepoziciojn, kaj en pluraj lokoj li uzas ilin ridinde („frapi SUR la pordo” - p. 14, „ŝi prenis lin ĈE la mano” - p. 23, „KUN botoj trakuri flakojn” - p. 61, ks.). Kion signifas esprimoj kiel „mi povus estinta” (p. 76) kompreni kapablus neniu gramatikisto. Verŝajne, se la eldonistoj bonvolus redakti la tradukon antaŭ ol ĝin presi, ĝi ne havus

plejmulton el la mankoj, kiuj ne koncernas la enhavon. Sed, ĉar FEL, eldonante la libron, opiniis redaktadon superflua lukso, oni neniuokaze rekomendu ĝin al homoj lingve nespertaj, por ke ili ne imitu ties erarojn.

Nikolao GUDSKOV

Leopold Vermeiren: *La egipta dancistino*. Tri erotikaj rakontoj. Tradukis Lode Van de Velde. Eld. FEL, Antverpeno, 1999. 95 p., kudre bindita; 20 cm. ISBN 90-71205-79-7. Prezo ĉe FEL: 11,17 eŭroj + afranko.

aŭ *Cigna kanto*. Sufiĉas citi du versojn el ĉi lasta por konstati la poetikajn ambiciojn de Mallia:

*Junuloj lamas.
La tempospac' etiĝas.*

Por verki poezion evidente ne sufiĉas kunmeti sintagmojn kiel „serpent-esplora”, „polusoj domopikaj”, „universo ventokirila” aŭ „noce nubi”. Sed Mallia ne limigas sin al tio. Diras Ragnarsson enkonduke al sia poemaro *Esploroj*: „Por mi poezio estas esploro; kaj maniero kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo.” Kaj Neves lastsomere en KEF, la helsinka festivalo: „Poezio estas animstato”. Perfektaj difinoj. Kiel Velebit, la maltano Mallia antaŭsentas la svagan ombron de morto, sed, krom retrorigardon, li prezentas samtempe ian vivan esperon, ofte en la formo aŭ figuro de oazo. Ĉu tien kondukas lia propra esploro? Poezio estas animstato - kaj, por esploristo, ankaŭ kompas.

Jorge CAMACHO

Carmel Mallia: *Marionetoj*. Eld. Bero, Berkeley, 1999. 62 paĝoj. ISBN 1-882251-28-8. Prezo ĉe FEL: 5,50 eŭroj + afranko.

Josip Velebit: *Kanto de telegrafistoj*. Eld. Bero, Berkeley, 1996. 78 paĝoj. ISBN 1-882251-14-8. Prezo ĉe FEL: 6,00 eŭroj + afranko.

Nova verko en la serio de FEL



Paĝoj: 106; ilustrita;
21 cm; kudre bindita;

Prezo: 12,00 €

Jen tri perletoj de la flandra literaturo. *Ceciljan mi vidis veni* estas proza poemo, idilio kun tragika fino, melankolia romano. En *La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforoza*, *begineto* la juna *begineto* Simforoza enamiĝas al la ĝardenisto Marteno, kiu poste eniras la monaĥejon. *Tre bela*, simpla kaj pura historio. *Kristnaska Triptiko* estas vera juvelo pro sia naiva, pia priskribo.

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: butikofel@esperanto.be

<http://retbutikofel.esperanto.be>

ESPERANTO

La nova latino de la eklezio

IN PRINCIPIO
En la komenco

CREAVIT DEUS
Dio kreis

CAELUM ET TERRAM
la ĉielon kaj la teron

Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la kompreniĝo inter kristanoj el la tuta mondo. Tiu ĉi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta

Esperanto-movado. Kaj ĝi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantaĝoj kristanaj esperantistoj ĉiam denove konsciigas.

Paĝoj: 142; 21 cm; kudre bindita;
Prezo: 7,95 €

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: butikofel@esperanto.be

<http://retbutikofel.esperanto.be>

Furoro de 



Furoro de 

Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be
TTT: <http://monato.esperanto.be>
Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Retpoŝto: smaul86150@aol.com

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Kováts, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Korektanto: Izabel C. Oliveira Santiago.

Grafiko: Hugo Fontyn, Jean Pierre Vandendaele, Guido Baeyens.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



MONATO - redaktoroj

Arto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ekonomio: Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio.
Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!)

El mia vidpunkto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com

Enigmoj: Jean Pierre Vandendaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio.
Reta adreso: jp@fel.esperanto.be

Eseoj: Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

Hobio: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Komputado: Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL.
Reta adreso: edmund@rano.org

Leteroj: Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Reta adreso: guido@fel.esperanto.be

Libroj: Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono.
Reta adreso: kolker@stratos.net

Noto: Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

Lingvo: YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp

Medio: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Moderna vivo: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com

Noveloj kaj Poezio: Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo.
Reta adreso: mattos@super.com.br

Politiko: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com

Scienco: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Spirita vivo: Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando.
Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

Sporto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ŝerco kaj satiro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com

Turismo: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at



Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

Manlavado

Finfine EU-komisiono en Bruselo ellaboris ankaŭ normon „Teknikoj de efika lavado de manoj”, kiu baldaŭ validos en ĉiuj membroj-ŝtatoj de Eŭropa Unio. Inter la gravaj kondiĉoj por membriĝo de novaj, precipe orientaj landoj, estos ankaŭ tiu ĉi klara normo, kiu savos la higienon de l' tuta kontinento. Vi povas mem testi la metodon laŭ la subaj desegnaĵoj kaj klarigoj.

1. Interfrotu la manplatojn.
 2. Metu la dekstran manplaton super la dorson de la maldekstra mano kaj inverse.
 3. Frotu la interplektitajn fingrojn je interno de la manplatoj.
 4. Lavu la kurbigitajn fingrojn.
 5. Alterne lavu la dikfingrojn.
 6. Frotu la fingropintojn sur la kontraŭa manplato.
- Finu la lavadon de manoj per lavado de la pojnoj.

EU-komisionano S. SMIGIELSKI



— anoncetoj —

Kreu vian propran librokatalogon! Per la komputila programo de la Retbutiko (<http://retbutiko.esperanto.be>) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu vi deziras libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de ĉiuj haveblaj verkoj de Marjorie Boulton aŭ de Nemere? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo* aŭ kiu estas la eldonjaro de *Murdo en Esperantujo*? Ĉio tio eblas en la retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin. Vi estas bonvena!


(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

Naturista Vivo, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fő u. 41/5 HU-8531, rete: jozefo@nl-papa.hu.

Jen la plej

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2001 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj



ABONTARIFO 2001

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugalio	3200 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2000 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	27 dolaroj	Usono	18 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Iun tagon, Bruno kaj Maryvonne Robineau forlasis sian farmon en Francio por migri ĉirkaŭ la mondo dum ok jaroj, por iri renkonten al la homoj, dividante ilian laboron kaj ilian ĉitutagan vivon.

Ili rikoltas lentojn en hinda vilaĝo, iniciĝas al la te-ceremonio en Japanio, partoprenas geedziĝfeston en kanaka tribo de Nov-Kaledonio kaj spertas mortminacon en Gvatemalio.

La zamenhofa lingvo malfermis al ili la intimecon de multaj familioj. Bela homkolektado ekde ĉina kamparano ĝis bulgara oficiro, tra hungara instruisto aŭ japana kadrulo.

*Fascina verko, kiu spiras kortuŝan homaramon kaj homecon.
(G. MacAoidh en Monato)*

Ili vivis sur la tero. 1998. Mendebila ĉe FEL kontraŭ 17,87 € + afranko.

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel:+32 3 234 34 00
Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 9 ĝis 12:
81 EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne bremsas la

disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavas ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj